


EL POPOLO
CINIO 2
1965





Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Kolektado de Ilici-
semoj *Foto de Vu Haŭ*
Dorse de la fronta kovrilo — Prezi-
danto Maŭ Zedong Balote Elektas
Ŝtatgvidantojn Kune kun la Aliaj
Reprezentantoj
Foto de Kian Ŝigie

Ponto al Feliĉo
Ĝojgaj Aferoj
La Popolkomunumoj en Ĉinio
Ĉinaj Virinoj sur la Vojo de Liberigo
Naskiĝo de 12,000-tuna Hidraŭlika
Premilo
La Vojo de Daĝaj
Ĉiu Membro Kreskas sub Ĝi Kva-
zaŭ Heliant' (*Kanto*)
Malsamaj Nacioj kun Sama Voĉo
Ĉiuj Nacioj de Ĉinio Prikantas
Socialismon (*Bildpaĝoj*)
Ordinara Laborulo
En Hejmo de Unu Komunumano
La Sportistinoj de Du Generacioj
Rakonto pri Papero kaj Skribiloj
Sur Unu Sama Fronto Batalas la
Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj
Transloĝiĝo (*Novelo*)
Vejiĉio (*Ĉina Ŝako*)
Post la Kurso
Sur Nia Librobreto
Esperanto Marŝas

Dorse de la dorskovrilo — Pejzaĝo
de Haŭhi *Foto de Vang Fuzun*
Sur la dorskovrilo — Ŝtuparaj Kam-
poj de Daĝaj
Foto de Song Hjujuang

ALDONO:

La Registaro de la Ĉina Popola
Respubliko deklaras: **AGRESO AL
VJETNAMIO SIGNIFAS AGRE-
SON AL ĈINIO**
650,000,000 Popolanoj Protestas



PONTO AL FELIĈO

*Popola komunumo estas prikantata en ĉinaj popolkantoj kiel ora
ponto al feliĉo. Vere ĝi meritas tian alegorion.*

*Depost sia naskiĝo la popolaj komunumoj antaŭenpuŝis la agrikul-
turan kolektivigon al pli alta stadio kaj kondukis la kamparanojn sin
savi el la maloftaj trijaraj naturaj katastrofoj. Per tio ĝi manifes-
tis debute sian potencon.*

*Evidente la popolaj komunumoj ludas gravan rolon en la socialisma
konstruado de Ĉinio. Tial nia gazeto aperigis ofte informojn, rapor-
tojn, korespondajojn kaj literaturajn verkojn pri ĝi por faciligi la
komprenon de la legantoj pri tio.*

*Tamen io nova ofte estas ne facile klarigebla ĉiuflanke nur per
kelkaj artikoloj, precipe afero kia popola komunumo, kiu troviĝis
neniam en la historio de Ĉinio kaj de aliaj landoj. Tial estas tute
nature, ke niaj legantoj de tempo al tempo demandis kun ĉiam pli
granda intereso al ni jen tion jen alion pri popola komunumo. Estas
nia devo iel kontentigi ilin per pli intensa informado tiuflanka.*

*En la nuna numero ni volas doni al la legantaro fundamentan klari-
gon pri la popola komunumo per la artikolo de k-do Ĝeng Ping.
Ĝi sufiĉe sisteme priskribis la historion, karakteron, organizadon kaj
funkciojn de la popola komunumo. Ni esperas, ke niaj legantoj
ricevos de ĝi panoraman bildon de la problemo.*

*Konkretajn ekzemplojn, interesajn priskribojn kaj detalajn rapor-
tojn kiuj povas doni klaran bildon pri iu flanko de la popola komunu-
mo ni laŭeble aperigas kaj aperigos kiel kutime. Ekzemple en tiu
ĉi numero oni povas legi ankaŭ raporton pri la vojo de Daĝaj, unu
produkta brigado de la samnoma popola komunumo, pri familia
vivo de komunumanoj ktp. De tiuj fragmentaj aspektoj oni ja
povas percepti la pulson de la popola komunumo kaj koni la spiriton
de la komunumanoj.*

*Por pli bona kaj pli taŭga informado de nia gazeto, ni atendas
pliajn sugestiojn de niaj legantoj.*

La Red.

ĜOJIGAJ AFEROJ

—NOTOJ PRI LA UNUA SESIO DE LA TRIA TUTLANDA
KONGRESO DE POPOLAJ REPRESENTANTOJ —

LA Novjartago de 1965 alportis al la ĉina popolo kaj la ĉina revolucio serion da ĝojigaj aferoj.

Jam plene venkitaj estas la malfaciloj en la disvolvado de la ĉina nacia ekonomio kaŭzita de la seriozaj naturaj katastrofoj dum la tri sinsekvaj jaroj de 1959 ĝis 1961 kaj de alies perfido. La Popolkomunumo jam plifirmiĝis kaj pliboniĝis. La agrikultura produktonivelo jam atingis tiun de la kompare bona jaro en la pasinteco pro la pliproduktado en la lastaj sinsekvaj jaroj. En la industria produktado aperis nova antaŭensalto en specoj kaj kvalito. Rimarkinde pliboniĝis la provizado de komercaĵoj. La varprezoj estas stabilaj. La financaj en- kaj el-spezoj estas ekvilibrataj. La kredito pri la cirkulanta mono plisolidiĝis. Novan disvolviĝon ricevis kulturo, eduko, higieno kaj fizika kulturo. Iom plialtiĝis la nivelo de la scienca esplorado. Pluan paŝon antaŭen faris la arma laboro

kaj la nacidefenda konstruado sur la vojo de revoluciigo kaj modernigo. Ĉiuj ĉi sukcesoj estas fruktoj kiujn la ĉina popolo rikoltis en persistado en unuiĝo, sinapogo sur siaj propraj fortoj, strebado por potenco, persistado ĉe la Ĝenerala Linio de la Socialisma Konstruado kaj sub la alte tenata ruĝa standardo de la pensoj de Maŭ Zedong.

Ankaŭ en la sfero de eksterlandaj aferoj, la ĉina popolo atingis grandajn sukcesojn unu post alia. Dum la pasintaj jaroj, Ĉinio fojfoje rebatis la furiozegajn atakojn de imperismo kaj ĉiulandaj reakciularoj, starigis diplomatajn rilatojn kun 50 landoj kaj komercajn kaj kulturajn rilatojn kun pli ol 120 landoj kaj regionoj. En tiu periodo, Ĉinio solvis siajn landlimajn konfliktojn historie postlasitajn kun Birmo, Nepalo, Mongolio, Pakistano, Afganio k. a. landoj kaj kontraktis kun serio da nove emerĝantaj azi-afrikaj landoj amikajn traktatojn aŭ traktatojn de amikeco kaj re-

Solena malfermo de la Unua Sesio de la Tria Tutlanda Kongreso de Popolaj Representantoj.





Partiaj kaj ŝtataj gvidantoj sur la podio (de maldekstre): Soong Chingling, Ĝou Enlaj, Peng Ĝen, Prezidanto Maŭ Zedong, Prezidanto Liu Ŝaŭki, Ĝu De, Deng Hiaŭping, Dong Bivu.


ciproka neagreso kaj aliajn interkonsentojn. La gvidantoj de la ĉina registaro kaj multaj aliaj landoj faris reciprokan vizitadon. Ĉinio sukcese eksplodigis sian unuan atombombon, rompis la nuklean monopolon kaj nuklean ĉantaĝon de imperiismo, plue grandigis la fortojn por defendo de la mondpaco, kaj kreis kondiĉon por kompleta malpermeso kaj ĝisfunda detruo de la nukleaj armiloj. La ĉina popolo havas pli kaj pli multe da amikoj, kaj la usona imperiismo renkontis jam pli grandan malsukceson en siaj ĉiuspecaj intrigoj por izoli Ĉinion.

La ĉina popolo retrorigardis kun ĝojo pri venko tiujn sukcesojn atingitajn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado dum la pasintaj jaroj; samtempe kun pli granda memfido ĝi bonvenigis la novan jaron por akiri pli grandajn sukcesojn. Kaj ĝuste en tia momento en Pekino malfermiĝis la Unua Sesio de la Tria Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Ĉina Popola Respubliko.

La Kongreso estas la plej supera organo de la ŝtata povo, la sola organo por plenumi la leĝdonan povon de la ŝtato. La reprezentantoj al ĝi estas elektitaj el ĉiuj provincoj, (aŭtonomaj) regionoj, urboj rekte sub la centra registaro, armeoj kaj elmigrintaj ĉinoj. Ĉiu ajn civitano kun la aĝo de 18 plenaj jaroj, sen limigoj de nacieco, raso, sekso, okupo, socia deveno, religia kredo, edukiteco, posedaĵo, loĝtempo ktp. rajtas esti elektanto kaj elektito. La reprezentantoj estas elektitaj per la metodo de sensubskriba balotado, kaj tiel la elektantoj povas esprimi sian volon plenlibere.

La pli ol 3000 reprezentantoj de la Tria Tutlanda Kongreso venintaj el diversaj lokoj de la lando, reprezentas la 650,000,000 popolarojn de la pli ol 50 nacioj de la tuta lando, reprezentas la laborulojn sur diversaj laborpostenoj en la socialisma konstruado, la armitajn fortojn de la granda ĉina popolo gardantajn la fruktojn de la socialisma konstruado, kaj reprezentas ankaŭ la elmigrintajn ĉinojn, kiuj

Ĉefministro Ĝou Enlaj faras la Raporton pri la Registaraj Laboroj.





La reprezentantoj diskutas en grupoj la Raporton pri la Registraraj Laboroj.

amegas sian patrolandon kaj loĝas en fremdaj landoj. Inter ili troviĝas veteranaj laboristoj lertaj en teknika renovigo, avangardaj produktantoj kiuj praktikas la principon sin apogi sur siaj propraj fortoj en disvolvado de agrokulturo, sciencistoj farintaj elstarajn kontribuojn en scienca esplorado, kaj intelektaj gejunuloj kiuj fiksloĝiĝis en la kamparo kaj tie ludas gravan rolon en ĉiuj laboroj. Revoluciaj aĝuloj kun arĝentaj haroj kaj junulinoj vigle paŝantaj..., ĉiuj ili kolektiĝis en la Popola Halo antaŭ la Ĉielpaca Pordego de Pekino, por revui la atingaĵojn de la landa konstruado, kaj studi la orientilon kaj tagordon por la tempo venonta, kontribuante siajn saĝon kaj opiniojn.

La nombro de la reprezentantoj en tiu ĉi kongreso plimultiĝis unu-kaj-duoble ol tiu de la lasta kongreso, kaj pli vasta estas ilia reprezentanteco en lokoj, nacioj kaj specoj de laboroj ol tiuj de la antaŭaj. Tio plene montris la pli fortan unuiĝon de la popolo de ĉiuj nacioj de Ĉinio, kaj plifirmiĝon kaj disvolviĝon de la popoldemokratia unueca fronto de Ĉinio.

Ĉar la reprezentantoj estas el diversaj frontoj de la socialisma revolucio, kaj ili profunde komprenis el siaj propraj spertoj en la praktikaj laboroj de klasbatalo, produktolukto kaj scienca eksperimentado, ke estas necese konduki la socialisman revolucion ĝisfine sur ĉiuj frontoj de ekonomio, politiko, ideologio kaj kulturo, tial la tuta kongreso estas plena je

la epoka spirito de seninterrompa kaj ĝisfunda revolucio. Tial la Kongreso alvokas, ke la ĉina popolo pli bone sin unuigu sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, daŭre strebado por prosperiĝo, kaj disvolu la spiriton de sinapogo sur siaj propraj fortoj por sukcese konstrui, en ne tro longa periodo, Ĉinion en grandan potencon socialisman landon kun modernaj agrokulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko.

En la unua sesio de la Kongreso dum dek kvin tagoj (de la 21-a de dec., 1964 ĝis la 4-a de jan., 1965) oni aŭskultis kaj atente diskutis la Raporton pri la Registraraj Laboroj faritan de la Ĉefministro Ĝou Enlaj, elektis kaj nomis la gvidantojn de la ŝtato kaj registaro, akceptis "la Rezolucion pri Raporto pri la Registraraj Laboroj, pri Ĉefaj Indikoj de la Naci-ekonomia Plano por 1965 kaj la Unuapaŝa Arangado de la Ŝtata Buĝeto por 1965" kaj aliajn.

Pri la politikoj por agado de la ŝtato kaj la gravaj problemoj en - kaj ekster-landaj, la reprezentantoj varme diskutis kaj en la grupaj kunsidoj kaj en la plenaj kunvenoj. Ili parolis ĉion kion ili scias kaj diris siajn opiniojn tute senrezerve. Ili priparolis kaj la sukcesojn kaj la malsukcesojn, faris kritikojn kaj memkritikojn kaj donis multe da valoraj proponoj.

Ankaŭ la respondeculoj de la registraraj sekcioj partoprenis la diskutadon. Ili aŭskultis

la kritikojn kaj proponojn, respondis demandojn, raportis atingajojn kaj spertojn kaj kontrolis la mankojn en laboroj. De la komenco ĝis la fino la sesio estis plena je popoldemokratia spirito.

Tiu demokratia spirito manifestiĝis ankaŭ en la tuta elektado de la ŝtataj gvidantoj. La nomlistoj de la kandidatoj por ŝtataj gvidantoj estis fiksitaj tra plena studado, fojrefoja diskutado kaj ripeta interkonsiliĝo. Ili estis diskutataj en la Supera Ŝtata Konferenco, en la demokratiaj partioj, en la plivastigita kunveno de la prezidantaro kaj en la grupoj de reprezentantoj de la Kongreso. Kaj fine ili estis elmetataj por balotado sen subskribo al la reprezentantoj.

Kiam la novaj gvidantoj de la ŝtato kaj la registaro estis unuvoĉe elektitaj de la reprezentantoj, la ĝoja atmosfero de unuiĝo en la Kongreso atingis la kulminon, tiu ĝoja tajdo tuj disfluis ekster la kongresejon kaj inundis la stratojn, laborejojn, lernejojn, kaj la tutan landon. Kie aŭdiĝis ke K-doj Liu Ŝaŭki, Ĝu De k. a. estas reelektitaj kiel ŝtataj gvidantoj, tie tuj eksplodis ondegaj de ĝojkrioj kaj estiĝis festotaga atmosfero kun ĝojbruoj de grandaj popolamasoj, kio plene esprimis la amegon kaj konfidon de la popolo al la ŝtataj gvidantoj. Precize kiel diris la kanto improvizita de Vej Hiumin, kantisto de Ĝuang-nacio, dum festado




Vespere de la 3-a de jan., la popolo en Pekino ĝoje kantas kaj dancas gratulante K-don Liu Ŝaŭki k. a. ŝtatajn gvidantojn pro ilia elekto.

ĉe la Placo de la Ĉielpaca Pordego:
*Printempe ruĝaj floroj pompas,
 Ĉi-hore 1' popolo jubile festas,
 Ĉar elektiĝis la bonaj ŝtatgvidantoj,
 Feliĉo socialisma senfina estas!*



Gelaboristoj de la Pekina Tria Ŝpinteksejo alportas en ĝiajn laborejojn la ĝojigan informon pri la elekto de K-do Liu Ŝaŭki k. a. ŝtatgvidantoj post ĝia ricevo el la radio.



La granda irigacia kanalo konstruita tra la gubernio Huahian.

LA POPOLKOMUNUMOJ EN ĈINIO

ĜENG PING

LA popolkomunumo estas nova formo kaj la baza unuo de socia organizo en la kamparo de Ĉinio. Ĝi profunde enradikiĝis en la ĉina grundo kvankam cirkulas ĉiaj oni-diroj pri ĝi en diversaj partoj de la mondo.

Tuj kiam la popolkomunumoj establiĝis, ili renkontis defiojn de grandaj naturaj katastrofoj kiuj trafis preskaŭ duonon de la ĉina kulturita tero en tri sinsekvaj jaroj. Sed la komunumoj eltenis ĉiujn provojn kaj pli-fortiĝis. Hodiaŭ 500 milionoj da kamparanoj de Ĉinio vivas en pli ol 74,000 komunumoj. Ili laboras por modernigi sian agrikulturon postgintan de jarcentoj.

KIEL ESTABLIĜIS LA POPOLKOMUNUMOJ

La kamparaj popolkomunumoj estis fonditaj en 1958, sed iliaj burĝonoj aperis pli frue.


Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 la kamparanoj efektivigis la agraran reformon

distribuante la teron poseditan de la bienuloj. Post tio ili establis agrikulturajn kooperativojn, kio estis paŝo antaŭen en organizado de agrikultura laboro kaj enkonduko de novaj teknikoj.

Poste la Unua Kvinjara Plano ekipis Ĉinion per juna industrio kiu povas provizi la kamparanojn per nombro da maŝinoj, insektomortigiloj kaj sterko. La Komunista Partio de Ĉinio elmetis la Ĝeneralan Linion de Socialisma Konstruado: "streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie".

Ĉio ĉi tio levis la iniciatemon de la ĉinaj kamparanoj kiuj delonge jam deziris akiri traktorojn, ĥemiajn sterkojn, insektomortigilojn, elektran energion, kaj bonajn irigaciajn kaj drenadajn sistemojn. Ili deziris praktiki multflankan ekonomion inkluzive terkultivadon, forstigadon, bestobredadon, flankokupojn kaj fiŝbredadon.

La membroj de Janggingdi-popolkomunumo kulturis sovaĝan monton.



Tamen ili sentis ke kaj la laborfortoj kaj riĉfontoj en iliaj kooperativoj estas limigitaj. Nemalmultaj kooperativoj posedis ter-pecojn interplektitajn, kaj ĉiu volis kultivi siajn terpecojn laŭ sia propra celo. Ofte aperis malakordoj. Estis malfacile por efektiviĝi terkulturadon kaj akvoutiligadon en granda skalo, aŭ mekanikigon kaj elektrigon.

Tial, en la lasta duono de 1957, iuj kooperativoj unuiĝis meminitate komunigante siajn riĉfontojn por konstrui malgrandajn akvorezervejojn, fosi irigaciajn kanaletojn tra siaj terpecoj, ekspluati montozajn regionojn, starigi metiejojn por fabriki terkulturajn instrumentojn kaj prilabori agrikulturajn produktaĵojn, kaj entrepreni multflankan ekonomion.

La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio rigardis epokfara tiun paŝon fare de la kamparanoj. Resuminte la spertojn de la kamparanoj en unuigo de siaj kooperativoj, la partio elpaŝis por gvidi la popolamasan movadon. Ĝi publikigis du dokumentojn: "Rezolucio pri la Establo de Popolkomunumoj en la Kamparo" kaj "Rezolucio pri Kelkaj Demandoj Koncerne la Popolkomunumojn".

La tajdo de popolkomunumigo envolvis la tutan landon je la fino de 1958.

LA KARAKTERIZAĴOJ DE LA POPOLKOMUNUMOJ

La du rezolucioj klare montras ke la komunumoj devas establi sistemon de socialisma kolektiva posedanteco. Ili devas efektiviĝi la principon "de ĉiu laŭ lia kapablo, al ĉiu laŭ lia laboro". Tiu ĉi kolektiva posedanteco diferencas de tiu de la tuta popolo.

La komunumoj estas socialismaj sed ne komunismaj laŭ ilia naturo.

Ili havas la saman posedantecon kiel la antaŭaj altgradaj agrikulturaj kooperativoj. Ili konservas ĉiujn avantaĝojn de la kooperativoj, kaj faras tute novajn progresojn, ĉar ili estas organizitaj en pli granda skalo kaj pli alta nivelo de kolektiva posedanteco.

La skalo de komunumo varias en diversaj partoj de la lando. Ĝi estas difinita de la kongreso de la popolkomunumo konforme al la lokaj cirkonstancoj por garantii bonan mastrumadon kaj

pliprodukton. La mezgranda komunumo ampleksas 2,000 familiojn, aŭ estas ĉirkaŭ naŭoble pli granda ol la antaŭa agrikultura kooperativo.

La komunumo tenas en si tri gradojn ĝenerale, t. e., la komunumo, la produkta brigado kaj la produkta grupo.

La kongreso de la komunumo, brigado aŭ grupo elektas el siaj membroj la gvidantojn de la komunumo, brigado aŭ grupo respektive.

En la nuna stadio, la produkta grupo estas la baza kalkula unuo de la popola komunumo. Ĉiu grupo tenas sendependan konton; ĝi faras buĝeton por la produktoplanoj kaj elspezoj, kaj distribuas enspezon al siaj membroj laŭ la propra totala enspezo. Ĝi estas la unuo kiu rekte organizas la produktadon, ĉar Ĉinio apenaŭ komencis mekanikigi sian agrikulturon, kaj la plejparto de la agrikultura laboro ankoraŭ estas farata de homoj kaj tirbestoj.

Kiam la antaŭaj kooperativoj kuniĝis en komunumojn, diversaj produktaj grupoj troviĝis en malsamaj ekonomiaj kondiĉoj. Ili fariĝis la baza kalkula unuo en la komunumo por eviti egalismen. Sed la komunumo kaj brigado donas apartan helpon al la malpli riĉaj grupoj por ke ili kuratingu la aliajn en produktado.

La produktaj grupoj deponas komunan fonduson por plimultigi la nombron de la plugbestoj kaj terkulturiloj kaj la kvanton de ĥemiaj sterkoj. Multaj el ili aĉetis pum-pilojn kaj aliajn modernajn agrikulturajn maŝinojn, nekonatajn en la kamparo de la malnova Ĉinio.

Popolkomunumo konstruas propraforte mezgrandan akvorezervejon.





Ŝirmzono sur Dongŝan-insulo.

La grupo ankaŭ prenas el sia enspezo malmultajn elcentojn kiel bonstatigan fonduson por subteni la grandaĝulojn, orfojn aŭ invalidajn membrojn, kaj helpi la malfortulojn.

La produkta brigado ludas gravan rolon en ligo de la komunumo kun la grupoj. Ĝi organizas la kooperadon inter siaj grupoj, kaj direktas la entreprenojn kune posedatajn de kelkaj grupoj.

Nun la brigado kaj la komunumo jam akumulis konsiderindajn komunajn fondusojn kaj disvolvis respektive siajn entreprenojn, kiuj ludas gravan rolon en akcelado de la tuta komunuma ekonomio.

Persistante ĉe la principoj “al ĉiu laŭ lia laboro” kaj interŝanĝo surbaze de egalvaloreco, la komunumo kuraĝigas la komunisman spiriton de reciproka helpo kaj kooperado. Por antaŭenpuŝi la produktadon ĝi faras apartajn penadojn por helpi la grupojn, malpli riĉajn ol la mezriĉaj. Rezulte de tio, la riĉaj grupoj fariĝas pli riĉaj dum la malpli riĉaj ilin kuratingas.

Kiam la komunumoj establiĝis, pli ol kvarono de la produktaj grupoj en Guangdong-provinco de suda Ĉinio estis neriĉa. Tamen, inter 30 kaj 40 procentoj de ili jam fariĝis riĉaj en la pasintaj kvin jaroj.

La popolkomunumoj faris grandan kontribuon en starigo de elementaj lernejoj kaj agrikulturaj mezlernejoj en la kamparo de Ĉinio. Preskaŭ ĉiuj komunumoj jam establis publikajn bibliotekojn kaj instalas radioelsendajn staciojn. Multaj el ili posedas siajn

rondirantajn filmoprojekciajn taĉmentojn kaj amatorajn teatrogrupojn.

Plejmulto de la popolkomunumoj tenas en si trigradan posedantecon kiu solvas la demandojn provizi unuigitan gvidantecon en la sfero de la komunumo kaj plene disvolvi la iniciatemon de la produktaj grupoj, kiuj rekte organizas la produktadon.

La produkta grupo estas la baza kalkula unuo en la plejmulto de la komunumoj en la nuna stadio. En nur kelkaj lokoj, la brigado aŭ la komunumo estas la baza kalkula unuo.


Post relative longa tempo la plia kresko de la ekonomio en la komunuma kaj brigada gradoj kreos favorajn faktorojn por fari la produktan brigadon la baza kalkula unuo. Kaj post ankoraŭ plia periodo la komunumo fariĝos la baza kalkula unuo.

ORGANO DE ŜTATO

Tre diference de la antaŭaj kooperativoj, la popolkomunumo funkcias kiel la baza ŝtata organo en la kamparo de Ĉinio. La funkciuloj laborantaj en la komunuma grado samtempe estas registaraj oficistoj. Tio ege helpas la ŝtaton por organizi kaj gvidi la kamparanojn en ilia mastrumado de la kolektiva ekonomio.

La popolkomunumoj prizorgas politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn aferojn. Ili distingiĝas de la altgradaj kooperativoj, kiuj estis nure ekonomiaj organizoj, kaj antaŭ ĉio, organizoj por agrikultura produktado. La komunumoj ĉiam devas klopodi por plenumi la taskojn elmetitajn de la ŝtato kaj zorgi pri la vivado de la popolo. Ili kombinas la kamparanan kolektivitan ekonomion kun la socialisma plano de la ŝtato.

La ŝtato ankaŭ investas grandajn sumojn por helpi la komunumojn en konstruado de grandaj akvo-utiligaj projektoj, instalado de agrikulturaj maŝinoj kaj establado de elektroenergiaj retoj.



KONTRAŬ NATURAJ KATASTROFOJ

Ekde 1959, la jaro, post kiam fondiĝis la komunumoj, grandaj sekegecoj kaj inundoj trafis Ĉinion dum tri sinsekvaj jaroj. Triono ĝis preskaŭ duono de la kulturita tero de la tuta lando suferis damaĝojn kiuj formis la plej malbonan plagon en centoj da jaroj.

La popolkomunumoj ekagis. Ili mobilizis ĉiujn kamparanojn kaj uzis ĉiujn rimedojn, inkluzive de la multaj akvoutiligaj konstruaĵoj pretigitaj en 1958. Damaĝoj estis reduktitaj aŭ kompensitaj, kaj la produktado restariĝis en la damaĝitaj regionoj. En la malnova Ĉinio, katastrofoj de malpli granda skalo malsatmortigis dekmilojn da homoj kaj faris milionojn senhejmaj kaj ilin igis formigri de la damaĝitaj regionoj.

Rikoltoj montris rimarkindan kreskon en 1962 tuj post la tri jaroj de naturaj katastrofoj, kaj en 1963, kiam multaj regionoj renkontis malbonan veteron. Guangdong-provinco, dense loĝata kaj grava grenprodukta regiono suferis en 1963 sekegecon daŭranta je pli ol 8 monatoj, la plej longan en 60 jaroj. Sed la komunumoj akiris grenan rikolton 550,000 tunojn, pli grandan ol tiu de 1962. La produkto de sukero kaj juto plimultiĝis je 80% kaj la sumo de dombestoj je 34%.

Ekde 1962 Ĉinio ricevis ĉiam pli grandan rikolton en ĉiu jaro. La urboj ricevis kreskantan provizon de viando, ovoj, lakto, legomoj, fruktoj kaj fiŝoj. Konstante malaltiĝis la prezoj.

ŜANĜIĜOJ EN LA KAMPARO

En la pasintaj jaroj la komunumoj plenumis grandegan laboron en akvoutiliga konstruado

Antaŭe en Guangdong-provinco troviĝis nur malgranda areo de agro kiu estis ekipita per irigaciaj instalaĵoj por kontraŭbatali 60-tagan sekegecon. Nun la areo de tia agro jam kreskis je pli ol 70%. Nun troviĝas en la provinco pli ol 90,000 akvorezervejoj kun totala kapacito de 30,000 milionoj da kubmetroj da akvo. Ili inkluzivas 22 grandajn akvorezervejojn kaj 173 mezgrandajn; escepte de unu granda kaj 18 mezgrandaj, ĉiuj konstruiĝis depost la fondiĝo de la komunumoj.


La konstruado de grandaj kaj mezgrandaj akvoutiligaj projektoj postulas unuecan planon, ĉar, el tio iuj produktaj grupoj povas pli multe profiti ol la aliaj, kiuj povas eĉ perdi parton de sia agro pro superakvo. Sen unueca gvido de la komunumoj ne eblas solvi tiajn konfliktojn de interesoj. La komunumoj ellaboras konkordiĝon inter la grupoj laŭ la principoj de memvola partoprenado kaj reciproka utilo.

En la pasinteco, la malgrandaj kooperativoj ne havis la eblecon reformi la agrikulturan teknikon. Ili ne kuraĝis riski, nek havis la necesajn laborfortojn kaj riĉfontojn.

Nun multaj komunumoj jam eltrejnis siajn proprajn agroteknikistojn, kiuj starigis teknikajn staciojn. Tiuj stacioj jam ludis gravan rolon en kultivado kaj disvastigado de bonaj specoj de semoj, plibonigo de grundo, efektiveco de racia densplantaĵo kaj en reformado de sistemoj kaj metodoj de terkulturado. Multaj komunumoj organizis postlaborajn grupojn en kiuj kunlaboras funkciuloj, veteranaj kamparanoj kaj teknikistoj super eksperimentaj terpecoj.

La komunumoj ellaboras ĉioampliksajn planojn por kiel eble plej bone disponi la laborfortojn kaj ĉerpi la riĉfontojn. La produktaj grupoj kulturas plantojn plej taŭgajn al la lokaj

Abunda Rikolto.



grundo kaj aliaj faktoroj. Iuj koncentrigis siajn klopodojn por kreskigi grenplantojn, aliaj industriajn plantaĵojn kiel oleplantojn, arakidojn aŭ sukerkanojn. La ĉirkaŭurbaj komunumoj donas antaŭecon al plantado de legomoj kaj bredo de kokoj, anseroj, anasoj por la urboj.

En multaj regionoj sub detruado de naturaj katastrofoj dum jarcentoj la komunumoj plantas arbojn, ŝtupigas nudajn montodeklivojn, ŝanĝante ilin en ŝtuparkampojn aŭ fruktoĝardenojn. En Julin, dezerta regiono en norda

Ŝenhi-provinco per plantado de arboj kaj herboj, kaj fosado de kanaletoj la komunumoj reakiris 34,700 hektarojn da tero de sub moviĝema sablo.

La popolaj komunumoj jam malfermis vojon por akceli agrikulturan produktadon, modernigi ĝin kaj firmigi la socialisman kolektivan ekonomion. Ili pavimis por la agrikulturo transiran vojon de la kolektiva posedanteco al tiu de la tuta popolo, vojon kiu fine kondukos al komunismo en la estonteco.

Ĉinaj Virinoj sur la Vojo de Liberigo

ĜANG JI

LA virinoj de la nova Ĉinio ĝuas same kiel la viroj egalajn rajtojn en la politika, ekonomia, kultura, socia kaj familia vivo. Sekve de la disvolviĝo de la socialisma konstruado tiu principo difinita en la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko realiĝas en la vivo ĉiam pli vaste kun la tempopaso.

En la malnova socio sub la regado kaj subpremado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kaj kaŭze de la ekzistado de la feŭdaj moroj kaj kutimoj, la virinoj suferis neimageblan malestimon kaj mizeron.

Hodiaŭ, la liberigitaj virinoj de Ĉinio aktive partoprenas en la mastrumado de la ŝtataj aferoj. En la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj la plej altpotenca organo de la ŝtato, sin trovas 542 reprezentantinoj, kiuj konsistigas 17.8 procentojn de la tuta reprezentantaro. Ili estas modelaj laboristinoj, kamparaninoj, sciencistinoj, kuracistinoj, aktorinoj, instruistinoj ktp. el diversaj laborpostenoj, kiuj akiris eminentajn sukcesojn en sia laboro. Dek naŭ el ili estas membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj, kaj krome estas ankaŭ vicprezidantino He Hiangning.

Same kiel viroj multaj kapablaj virinoj laboras kiel gvidantaj funkciuloj en ŝtataj organoj de ĉiuj niveloj. La fama politika kaj socia aktivistino Soong Chinling estas unu el la vicprezidantoj de la ŝtato. Estas pli ol 300 virinoj kiuj laboras kiel

vicministroj, vicprovincestroj, urbestroj, guberniestroj kaj distriktestroj.

En la jaro 1953, kiam okazis la unua baloto en la bazaj unuoj tra la tuta lando 84 elcentoj de la registritaj elektantinoj voĉdonis. Tio ja estis la unua fojo, kiam la virinoj ĝuis egalan elektan rajton kiel la viroj. En 1963 dum la baloto en la bazaj

Como, liberiĝinta servutulino de Tibeto, estas elektita reprezentantino al la Tria Tutlanda Kongreso de la Popolaj Reprezentantoj. Jen ŝi balotas pro la ŝtataj gvidantoj en la Kongreso.





Sciencistino Hoü Joütang (dekstre) kaj ŝia studentino faras sciencan esploradon en la Paleontologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj.



Ankaŭ aviado estas kampo por virinoj. Aviadistinoj analizas la taskon kaj kondiĉojn antaŭ ekflugo.

unuoj la nombro de voĉdonintinoj atingis pli ol 90 elcentojn.

Diversaj estas la laboroj, per kiuj sin okupas la virinoj. Sur ĉiuj laborpostenoj, escepte de iuj okupoj netaŭgaj por la fiziologiaj kondiĉoj de virinoj, videblas virinoj. Nun en Ĉinio estas nemal multe da traktoristinoj, aviadistinoj, pilotinoj, paraŝutistinoj, vagon-ekspedantinoj kaj geologiaj esploristinoj.

Multaj virinoj, kiuj atingis grandajn sukcesojn en sia laboro estis promociitaj al teknikistinoj, inĝenierinoj kaj administraj gvidantinoj. En la ŝpinteksa industrio de Ŝanhajo sola jam sin trovas ĉirkaŭ mil teknikistinoj kaj inĝenierinoj. Kvinono de la esplorantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj estas virinoj.

En la malnova socio la virinoj povis akiri nur salajron trionan aŭ duonan de tiu de la viroj. Sed nun same kiel la viroj la virinoj povas ricevi egalan rekompencan por egala laboro kaj ĝui senpagan kuracon kaj bonstatigan traktadon. Kaj la laboristinoj kaj oficistinoj ricevas specialan zorgon dum akuŝado.

En la kamparoj dank' al la efektivigo de la kolektivigo de agrokulturo la virinoj havas pli kaj pli multe da ŝancoj por partopreni en la agrokultura produktado kaj flankproduktado. Multaj virinoj estas elektitaj kiel brigadestroj aŭ popolkomunumaj estroj. Kaj iuj kamparaninoj fariĝis agronomoj kaj teknikistoj. La 55-jara kamparanino Ĝang Kiuhiang estas la unua kamparano-

esploristino de la Agronomia Akademio de Ŝenhi. Ŝi famiĝis tra la tuta lando pro sia elkulturo de altprodukta koton kaj ellaboro de kompleto da scienca sperto pri kotonkulturado.

Vasta partopreno de virinoj en la sociaj laboroj kreis grandan kvanton da riĉaĵoj por la ŝtato kaj plirapidigis la socialisman konstruadon. Samtempe tio ankaŭ pliigis la familiajn enspezojn rezulte de ilia salajrenspezo kio siavice plibonigis la vivon kaj la edukon al la gefiloj. Sekve, la sinteno de la socio kaj la familio al la virinoj ŝanĝiĝis radikale.

En la jaro 1950 la Registaro publikigis la Leĝon pri Geedziĝo por garantii la laŭleĝajn rajtojn de virinoj. Ekzemple, la libereco en geedziĝo, monogamio, la egalrajteco de viroj kaj virinoj kaj laŭleĝaj rajtoj de virinoj — ĉio ĉi estas garantiata de la leĝo. Ĉiuj malbonaj virinosubigaj kutimoj kaj moroj postlasitaj de la feŭda socio de la malnova Ĉinio, kiaj poligamio, infan-fianĉino (knabino el malriĉa familio vendita al la fianĉa familio por sklave servadi ĝis la geedziĝo), interveno al reedziniĝo de vidvino, mallibereco en geedziĝo kaj postulo de edziniga mondonaco, kaj malestimo al virinoj ktp. — ĉio ĉi estas malpermesataj de la leĝo kaj publiko.

Tio, ke la ĉinaj virinoj povis akiri tiujn ĉi rajtojn ja estas la rezulto de la longdaŭra malfacila revolucia batalo sub la gvido de la Kompartio de Ĉinio. La vasta amaso de ĉinaj virinoj profunde konscias, ke la virina movado estas konsistiga parto de la ĉina revolucia movado, ke sen la liberiĝo de la

ĉina popolo ne eblas la liberiĝo de la ĉinaj virinoj. Tial en la pasinteco, la vasta amaso de virinoj aktive partoprenis en la nacidemokratia batalo kaj la virinoj en la revoluciaj bazlokoj aŭ liberigitaj regionoj partoprenis en konstruado kaj subtenis la fronton kun granda entuziasmo. Iuj virinoj eĉ batalis kun la viroj ŝultron ĉe ŝultra. La virinoj, kiuj estis en la regionoj troviĝantaj sub la regado de Ĉiang Kajŝek aktive partoprenis en la patriotisma lukto kontraŭ imperiismo. Sub la gvido de la Kompartio de Ĉinio la virinoj de ĉiuj socitavoloj unuiĝis kaj dum la longdaŭra malfacila revolucia batalo sindone faris altvaloran kontribuon por la naciliberiĝo kaj liberiĝo de la popolo, kaj faris multe da brilaj kortuŝaj heroaĵoj.

Ekzemple, 15-jara kompartianino Liu Hulan preferante morton ol submetiĝi oferis sian vivon sub la pajlo-tranĉilo de la malamikoj por la liberiĝo de la ĉina popolo. La gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ skribis epitafon pri ŝi: "Granda vivo kaj glora morto".

Post la liberiĝo la ĉinaj virinoj jam fariĝis nemankeblaj fortoj en la socialisma revolucio kaj

socialisma konstruado. Ili faris gravan kontribuon en industrio, agrokulturo kaj diversaj aliaj produktofrontoj. En la movado "kompari kun la antaŭirantaj laboristoj kaj unuoj, lerni de la progresintaj ideoj kaj labormetodoj, klopodi por kuratingi la avangardajn kaj helpi al la postĝintaj por pliprodukto kaj ŝparo" disvolviĝanta tra la tuta lando, multaj virinoj montris altan entuziasmon en laboro, multe akcelis la produkton kaj aperis inter ili multaj progresintaj kolektivoj kaj personoj.

La ĉinaj virinoj ne nur ludas gravan rolon en la konstruado de sia lando sed ankaŭ ludas aktivan rolon en la internacia sfero. Ili profunde kompartias kaj forte subtenas la revolucionan batalon de la virinoj de ĉiuj landoj, precipe de tiuj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiuj batalas kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismo kaj por la nacia sendependeco kaj mondpaco. Ĉar ilia batalo samtempe ankaŭ estas grava subteno al la ĉina popolo. Ĉio ĉi plifirmigis la solidarecon kaj amikecon inter la ĉinaj virinoj kaj la virinoj de ĉiuj landoj tra la tuta mondo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



LA ĈINA REGISTRARO SUBTENAS INDONEZION ELIĜI EL UNO

La Ĉina Popola Respubliko deklaris je la 10-a de jan., 1965, sian firman subtenon al la Respubliko Indonezia en ĝia decido eliĝi el UNO.

La Deklaro de la Ĉina Popola Respubliko montris, ke la pli kaj pli multaj faktoj okazintaj dum la pasintaj dudek jaroj pruvis, ke UNO jam fariĝis instrumento de imperiismo kaj la nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono. Koncerne al Azio, ĝiaj popoloj ĉiuj scias, ke ĝuste utiligante la organizon de UNO la usona imperiismo faris la agresan militon en Koreio kaj intencas uzi UNO-n por savi sin de la milita fiasko en Hindoĉinio. Estas plenklares, ke Usono kaj ĝia lakeo, la sudvjetnama reĝimo atencis Kamboĝon, sed UNO insistis pri kalumniado al Kamboĝo. Rilate Afrikon, la usona

imperiismo utiligante UNO-n faris ĉion malbonan en Kongolando (Leopoldvil) kaj indignigis ĝian popolon ĝis ekstrema. La produkto de nova koloniismo, Malajsio, fabrikita en komploto de la brita kaj usona imperiismo estas kvazaŭ ponardo metita de imperiismo en la koron de sudorienta Azio. Ĝi minacas kaj Indonezion kaj ĉiujn popolojn en sudorienta Azio. Nun la brita kaj usona imperiismo eĉ sidigas ĝin sur seĝon en la Sekura Konsilo de UNO — kia netolereblaĵo por la tuta popolo de la mondo!

La Deklaro montris, ke UNO jam fariĝis tia ke oni devas ĝin retaksi laŭ ĝia agado. Ke la Ĉina Popola Respubliko estas delonge ekskluzivita ekster UNO kaj nun la Respubliko Indonezia estas devigata eliĝi el ĝi sufiĉe bone montras, ke tiu tiel nomata monda organizaĵo devas esti komplete reformita.

La Deklaro plie asertas ke la eksmembriĝo de Indonezio el UNO estas ago tute justa kaj centprocente ĝusta kaj montras la firman decidon de 650,000,000 ĉinoj batali kune kun la 104,000,000 popolanoj de Indone-

zio manenmane por oponi imperiismon kaj la novan kaj malnovan koloniismojn, subteni la lukton por nacia sendependeco kaj defendi la mondpacon.

ĈINIO AMIKIĜIS KUN DU PLIAJ LANDOJ EN AFRIKO

Estas decidite ke diplomatia rilato de ambasadoreco estu oficiale starigita inter la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Registaro de la Respubliko de Dahomeo laŭ la Komuniko kune subskribita la 12-an de nov., 1964. Alia interkonsento pri starigo de oficiala diplomatia rilato kaj intersendo de diplomatia reprezentanto de ambasadora rango estis atingita la 29-an de la sama monato inter la Ĉina Popola Respubliko kaj la Respubliko de Zambio. Ambaŭ registaroj unuanime konsentis disvolvi la interrilatojn de amikeco kaj kunlaborado laŭ la kvin principoj t. e. reciproka respekto al la suvereneco kaj teritoria integreco, neinteragreso, reciproka neinterveno en la internaj aferoj, egaleco kaj reciproka utilo kaj paca kunekzisto.

Naskiĝo de 12,000-tuna Hidraŭlika Premilo

JAM naskiĝis 12,000-tuna hidraŭlika premilo por libera forĝado, kiun projektis, fabrikis kaj muntis la nova Ĉinio mem. Ĝi havas pli ol 40,000 partojn. Por fabriki iujn el ili oni bezonas grandajn ŝtalgisajojn kaj forĝaĵojn pezantajn je pli ol cent tunoj, kaj specialistojn kiuj bone scias la teknikon por fabriki tiujn partojn. Tiuj kondiĉoj ne estis pretaj en Ĉinio. Tamen dum la mallonga tempo de kvar jaroj tia kompleksa kaj grandega maŝino finfine estas elprojektita kaj elfabrikita.

VENKU LA MALFACILOJN PROPRAFORTE

En la malriĉa kaj postiginta malnova Ĉinio, eĉ mezgrandan aŭ malgrandan hidraŭlikan premilon oni ne kuraĝis malmunti kaj ripari, por ne paroli pri fabriko de tia grandega maŝino. Pro tio ke nia forĝa industrio ankoraŭ ne povis fabriki tre grandajn pecojn, tiajn forĝaĵojn bezonatajn de diversaj sektoroj de la nacia ekonomio post la Liberigo ni devis importi el eksterlando. Iuj landoj ne deziras rapidan disvolviĝon de nia nacia industrio, kaj ne volas vendi al ni multe de grandaj forĝaĵoj. Tial iuj el niaj industriaj sektoroj ne povis esti rapide disvolvitaj, kvazaŭ kun ĉirkaŭpremata gorĝo.

En 1958, komenciĝis la antaŭensaltego de la industrio kaj agrikulturo de Ĉinio, kaj leviĝis la tajdo de teknikaj renovigado kaj revolucio. La registaro decidis tuj komenci la fabrikadon de hidraŭlika forĝa premilo de dekmil-tuna klaso.

Ĉi tiu grava tasko metiĝis sur la ŝultrojn de la inĝenieroj kaj laboristoj de Giangnan-ŝipfabriko en Ŝanhajo. Tiam iuj opiniis, ke estas neeble por ni elfabriki hidraŭlikan forĝan premilon de dekmil-tuna klaso, ĉar mankis al nia lando grandaj ekipaĵoj, teknikaj spertoj kaj lertuloj. Tamen la inĝenieroj kaj laboristoj de la nova Ĉinio elmetis la batalan sloganon: "Ni elfabriku dekmil-tunan hidraŭlikan premilon firme nin tenante al la principo sin apogi sur siaj propraj fortoj, por progresigian forĝan industrion!"

MIRAKLO EL LA HOMAJ MANOJ

Vojoj formiĝas per irado de homoj kaj mirakloj kreiĝas per homaj manoj. Por fabriki grandegan ekipaĵon kia dekmil-tuna hidraŭlika premilo, ĝenerale oni devas havi unue grandegajn ekipaĵojn por gisi, forĝi kaj ŝarĝlevi kaj grandajn ilmaŝinojn,


alie oni ne povas entrepreni la produktadon kaj prilaboron. Tamen, tiam en Giangnan-ŝipfabriko troviĝis neniu el tiaj ekipaĵoj.


Kion fari do?

La inĝenieroj kaj laboristoj de la nova Ĉinio tamen brave sturmis al la malfaciloj kaj ilin venkis per sia saĝo.

Ekzemple, en aliaj landoj oni ĝenerale uzas ŝtalgisajojn por fari transversan trabegon de hi-

La Dekdumil-tuna hidraŭlika premilo premforĝas ŝtalan ingoton.





Manipulejo de la giganta hidraŭlika premilo.

draŭlika premilo, sed tiam mankis al ni granda muldekipaĵo kun pli ol cent-tuna kapacito. La projektistoj kaj laboristoj diskutis foj-refoje, kaj decidis uzi anstataŭ ŝtalgisajo kunvelditan ŝtalpecon. Tiam la tekniko de elektroskoria veldo estis ĵus enkondukita en nian landon. Por mastri la teknikon de elektroskoria veldado kaj studi ĉu veldaĵo taŭgas aŭ ne, la veldistoj kaj teknikistoj kune faris centojn da eksperimentoj, kaj finfine sukcesis.

Krome, dekmil-tuna hidraŭlika premilo havas pli ol dek grandegajn partojn pezantajn po ĉirkaŭ cent tunojn, kaj la plej granda eĉ pezas preskaŭ tricent tunojn. Dum la veldado kaj prilaborado oni bezonas grandegajn ekipaĵojn por ilin levi kaj translokigi. Kvankam tiam mankis al ni taŭgaj ŝargleviloj, sed niaj laboristoj solvis la problemon per kombina apliko de multaj indiĝenaj kaj modernaj metodoj.

LERTIĜO EN PRAKTIKO

Kion fari pri la manko de teknika sperto kaj lertulo?

La inĝenieroj kaj laboristoj de la nova Ĉinio faris jene: praktike apliki la teorion lernitan el la artikolo "Pri Praktiko" verkita de Prezidanto Maŭ Zedong, kombini la teorion kun praktiko, kaj spertigi kaj lertigi teknikistojn en la projektado kaj fabrikado de la hidraŭlika premilo.

K-do Ŝen Hong, kiu prenis sur sin la taskon de ĝia ĉefprojektanto, estas indiĝena specialisto kreskinta dum longtempa hardado en malgranda fabriko de Jan-an — la sankta revolucia centro. Li neniam projektis hidraŭlikan premilon. Ankaŭ la aliaj ĉirkaŭ dek junaj projektantoj venintaj el diversaj lokoj por labori kiel liaj helpantoj estis senpertaj en tio. Krom la ĉefprojektanto kiu iam vidis eksterlande hidraŭlikan premilon de

dekmil-tuna klaso, ĉiuj aliaj eĉ neniam vidis tian ekipaĵon. Ĝuste ĉi tiuj senpertuloj tamen ne revis inviti specialistojn kaj konsilantojn el fremdlandoj, sed mem solvis ĉiujn malfacilojn kaj problemojn renkontitajn.

Antaŭ ol komenci la projektadon, ili unue vizitis diversajn urbojn por observi kaj esplori la strukturajn principojn kaj funkcion de malgrandaj kaj mezgrandaj hidraŭlikaj premiĵoj. Poste ili studis la kolektitajn teknikajn materialojn kaj aliajn koncernajn desegnojn, prospektojn, fotografajojn, gazetojn kaj librojn, kaj faris komparon kaj analizon. Ili faris multfojan diskutadon, eliris la esencojn de la jam konataj hidraŭlikaj premiĵoj en- kaj ekster-landaj, kaj aplikis ilin en sia projekto farante al ili multe da raciaj plibonigoj laŭ la principo belaspekta kaj facila por uzado, fabrikado, muntado kaj riparo, kaj la bezonoj de la reala cirkonstanco de nia lando. Ekzemple, kiel laborcilindroj de grandega hidraŭlika premilo, en aliaj landoj oni ordinare uzas tri laborcilindroj el kiuj ĉiu havas kapablon de 4,000-tuna premo. Tiaj cilindroj estis malfacile fabrikeblaj por ni. Tial la projektantoj proponis anstataŭigi ilin per ses cilindroj, el kiuj ĉiu havas kapablon de 2,000-tuna premo.

Ripetfoje esplori kaj studi, eksperimenti kaj provi, kombini kuraĝan kreemon kun respekto al scienco — jen estas la vojo de la ĉinaj inĝenieroj kaj laboristoj por konkeri la mankon de scio kaj sperto, kaj samtempe ankaŭ la vojo por kulturigrandan nombron da altgradaj lertuloj de tekniko.

Tio ĉi estas unu plia granda venko de la ĉina popolo en sia socialisma konstruado laŭ la politiko sin apogi sur siaj propraj fortoj kaj strebi energie por la prospero de sia lando. Ĝi ĝojas pro sia venko kaj klopodas por surgrimpi pli altan supron de industria tekniko.

LA VOJO DE DAĜAJ

MIN ŜE

DAĜAJ HIERAŬ KAJ HODIAŬ

Daĝaj, mont-vilaĝo tre malmulte konata en la pasinteco, nun jam estas standardo de la agrikultura produktado kaj modelo de la agrikulturaj komunumoj en la tuta Ĉinio.

La Daĝaj-a Produkta Brigado de Daĝaj-komunumo, Ŝanhi-provinco situas en Tajhang-montaro. Ĝi havas pli ol 4760 pecojn da tre malfekundaj kampoj dislokitajn en valoj kaj sur deklivoj kun suma areo de 802 muoj. Antaŭ la Liberiĝo oni rikoltis pomue malpli ol 70 kilogramojn da greno eĉ en senplaga jaro. La pli ol 60 kamparanaj familioj de la tuta vilaĝo, suferantaj kruelan ekspluatadon de bienuloj kaj riĉaj kamparanoj, plejparte estis devigataj labori kiel jar- aŭ tag-dungitoj aŭ paŝtistoj de ili, kaj iuj sin vivtenis eĉ per almozpetado.

La hodiaŭa Daĝaj tute ŝanĝiĝis. La montoj kaj valoj restas la samaj, sed aliĝis la fizionomio

de la kampoj. La pli ol 4760 malgrandaj terpecoj kuniĝis en 2900 kampojn, kaj la areo estis vastigita pli ol 80 muojn. Nun “vidiĝas kampoj en ĉiuj valoj, sur ĉiuj deklivoj — cerealoj”. La malriĉa loko kun mizeraj montoj kaj teruraj akvoplagoj — transformiĝis en abunda produktejo de grenoj, porkoj kaj ŝafoj kun aroj kaj aroj da ŝarĝbrutoj.


REFORMO DE LA NATURO

La ŝanĝiĝo de Daĝaj komenciĝis post la organiziĝo de la kamparanoj.

En la jaro 1953 stariĝis elementa agrikultura kooperativo en Daĝaj-vilaĝo. La kolektivigitaj kamparanoj tuj faris planon por reformi la naturon. Ili volis konstrui akvobaraĵojn en la sep grandaj kaj dekoj da malgrandaj valoj, por ke la grundo alportita de montotorentoj restiĝu kaj formu fekundajn kampojn, kaj volis reformi la pli ol 4760 distranĉitajn kampojn deklivajn kaj ĝibajn en ŝtuparajn kampojn.

En la sezono de abunda rikolto.





Grandega estis tiu baza konstruado, sed ĝi ne timigis la kolektivajn kamparanojn de Daĝaj.

En la vintro de 1953, sub la gvido de la kadroj de la kooperativo la kamparanoj de Daĝaj komencis konkeri la unuan celitaĵon — Bajtuo-valo spite al frosta vento. Tiu ĉi valo longas ĉirkaŭ 800 metrojn kaj larĝas pli ol dek metrojn, kaj bezonis konstrui pli ol dudek ŝtonbaraĵojn. Dum la konstruado la kooperativanoj manĝis kaj ripozis sur la konstruejoj. Ĉiutage ili elvilaĝis tuj kiam ektagiĝis kaj revenis nur kiam la steloj ekpalpebrumis. Tiamaniere ili unuspire laboris unu kaj duonan monatojn kaj finfine aperigis kampojn en Bajtuo-valo.

Tre ĝojiĝis la kooperativanoj pro tio ke la dezerta valo fariĝis fekundaj kampoj, kaj nomis ĝin “Koopera Valo”. El tio ili vidis la kolektivan forton, kaj decidis daŭrigi la antaŭeniron. Tra 5 vintroj kaj 5 printempoj ili konstruis pli ol 180 ŝtonbaraĵojn kun suma longeco de 7.5 kilometroj, du surmontajn kanalojn, du akvorezervejojn, pli ol 3000 skvamajn fosaĵojn kaj akvotenejojn, kaj reformis 300 muojn da dekliva agro en ŝtuparajn kampojn.

SUR LA VOJO DE SCIENCA EKSPERIMENTO

Sur la vojo de disvolvo de agrikultura produktado, la daĝaj-anoj renkontis novan problemon: Estas bezonate disvastigi novajn teknikojn, se oni volas rikolti pli multe; sed tion multaj homoj ne kredis. Kion do fari? La sola solvo estas iri la vojon de scienca eksperimentado.

Iu foje teknikisto de la gubernia teknikodisvastiga stacio diris al kadroj de la brigado, ke sterko preparita el miliaj tigoj kun spikoblankiĝa malsano kaj eĉ fekaĵo de tirbestoj, kiuj manĝis tian fojnon povas infekti per la malsano la novajn plantidojn sur la kampoj al kiuj tiaj fekundigaĵoj

estis uzitaj. La brigada kadroj sciigis tion al la kooperativanoj, sed neniuj kredis. Ili diris: “Ni generacion post generacio nutris tirbestojn per tia fojno, sed tio ne plivastigis la malsanon.” Kiel oni povas kredigi al la kooperativanoj la novan teknikon? La kadroj aranĝis 8 dekonojn de muo da kampo kaj sur ĝi aparte sterkis per tia fekundigaĵo. Kiam la miliplantoj kreskis altaj, vere okdek du elcentoj de ili blankiĝis. Ne kredu al aŭdita afero, sed ĉio vidita estas vero. La kooperativanoj diris: “Ja bone efikas la nova tekniko!”

El tio la kadroj de Daĝaj-brigado trovis metodon por disvastigi novan teknikon, nome: eksperimento, dono de ekzemplo kaj disvastigo.

La kadroj havas siajn eksperimentajn kampojn, kaj ankaŭ la kooperativanoj tion havas; eksperimentaj kampoj estas kaj sur deklivoj kaj en valoj. Ili prove kulturis diversajn plantojn kaj prove uzis diversajn teknikojn, kaj el ili selektis la plej taŭgajn al Daĝaj.


La kooperativanoj de Daĝaj-brigado kombinis energian revolucion spiriton kun severa scienca sinteno, kaj gajnis grandajn venkojn unu post alia. Ekde la jaro 1953, en kiu stariĝis la elementa kooperativo ĝis 1962, la meznombra pomua produktokvanto de grenoj kreskis de pli ol 50 kilogramoj ĝis 387 kilogramoj.

ANTAŬ MALFACILOJ

En 1963 Daĝaj-brigado spertis seriozan elprovon.

Malofta torenta pluvego daŭris de la 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto. La pluvokvanto de tiuj sep tagoj egalas al tiu de la tuta jaro 1962-a.

La montotorentoj detruis la pli ol 100 ŝtonbaraĵojn pene konstruitajn en la pli ol dek jaroj, sulkegoj formiĝis tra la ŝtuparaj kampoj, la gren-



*Ke la sovaĝaj montoj
produktu grenon.*

plantoj aŭ detruigis aŭ falis. Ruiniĝis 113 el la 140 terdomoj de la vilaĝo kaj 77 el ĝiaj 125 ĉambroj detruigis.

Sed la daĝaj-anoj jam ne plu estis sklavoj de la naturo.

Ili diris: “Ni ne lasos aliajn nin helpi se nur ni povas mem trapasi la vojnon. Ni ne devas peti monhelpon de la ŝtato se nur ni povas mem solvi la malfacilojn!”

La daĝaj-anoj volis venki la malfacilojn sin apogante sur siaj propraj fortoj. Ili restarigis la faligitajn maizplantojn aldonante al iliaj radikoj ŝirman teron, kaj restarigis la miliajn plantojn kunligante ilin en faskojn. Kaj verdaj aŭtunaj legomoj estis kreskigitaj sur la senrikoltaj parceloj.

Venkis la malcedema spirito de la daĝaj-anoj sin apogantaj sur siaj propraj fortoj. Post tia serioza plago ili tamen akiris bonan rikolton kun pomua produktokvanto de 275 kg. En la malfacilaj tagoj la daĝaj-anoj ne petis eĉ unu solan

moneron da helpo de la ŝtato, kaj liveris al la ŝtato grenan imposton laŭ la difinita cifero.

Unu jaron post la katastrofo, la daĝaj-anoj denove gajnis brilan venkon.

Estis riparitaj 62 domoj tuj falontaj pro la pluvego, 37 familioj perdintaj siajn domojn transloĝigis en nove konstruitajn domojn. 130 el la 180 muoj da kampoj detruitaj de la torentoj estis rekonstruitaj, la 70 elcentoj de la kampoj lavitaj de la torentoj estis riparitaj. En la somero de 1964, ili rikoltis pomue 134.5 kg. da tritiko sur 40 muoj da kampoj, kaj tio kreis rekordon senprecedencan en ĝia historio. Aŭtune la daĝaj-anoj ricevis oran rikolton, kaj la pomua produktokvanto de greno atingis 413 kg.

Nun la spirito de Daĝaj disfamiĝis tra la tuta Ĉinio. Ĝi estas la ĉefa forto por reformi la postigintan kamparon en progresan. Por ŝanĝi la kamparanan vivon kaj modernigi la agrikulturon oni devas sin apogi ĝuste sur tiu forto.

Heroaj Daĝaj-anoj.



Ĉiu Membro Kreskas sub Ĝi Kvazaŭ Heliant'

Vortoj de Ĝang Ŝihie
Elĉinigiis Laŭlum
Muziko de Vang Juhi


Gaje kaj vigle



Ĉi- am ver- da plan- to es- tas ni- a ko- mu- num',
Mil mil mem- broj u- nu- i- ĝas en la ko- mu- num',
Ni- a po- pol- ko- mu- nu- mo es- tas ru- ĝa sun',
Mil mil fa- mi- li- oj sub la ko- mu- nu- ma sun',



Ĉi- u mem- bro es- tas sur ĝi u- nu me- lon'.
Ĉi- uĵ stre- bas por la pro- dukt- pla- na ple- num'.
Ĉi- u mem- bro kres- kas sub ĝi kva- zaŭ he- li- ant'.
Ĝin a- man- te, al al- te- ga ce- lo stre- bas nun.



Ĉi- ujn fruk- tojn viv' Li- gas kun la tig'.
Gran- das ni- a fort', Ri- ĉas la ri- kolt'.
Bri- las la sun- lum', Be- las flor- gi- gant'.
Dank' al ĝus- ta gvid' De la Kom- par- ti',



Ju pli gran- das la ko- mu- na plant',
Ne pa- ro- lu pri se- keg' aŭ i- nund- plag',
Mal- graŭ plu- ve- go kaj u- ra- gan',
La mi- rin- da se- mo de fe- liĉ'



Des pli dòl- ĉas ĉiu me- lon- gi-
Eĉ ĉi- el- fa- lon ven- kos ni- a
Sin tur- nos for de ĝi ja ne- ni- u
Jen ek- ĝer- mi- ĝas ja por ĉi- uĵ



gant'.
brak'.
an'.
ni.

MALSAMAJ NACIOJ KUN SAMA VOĈO

—Pri Festivalo de Kantoj kaj Dancoj de Nacimalplimultaj Amatoroj—

LA artoj de la ĉinaj nacimalplimultoj neniam ricevis altan pritakson en la malnova Ĉinio, por ne paroli pri tia okazo, en kiu amatoraj artistoj de ĉiuj nacioj tra la tuta lando gaje kunvenas kaj arde kantas kaj dancas. Sed tio okazas nun en la nova socialisma Ĉinio.

Ĉe la jarfino de 1964, tuj sekve de la arda prezentado de pekinaj operoj pri revoluciaj nuntempaj temoj kaj antaŭ la malfermo de la Unua Sesio de la Tria Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj inaŭguriĝis en Pekino Festivalo de Kantoj kaj Dancoj de Nacimalplimultaj Amatoroj de la tuta lando.

En Ĉinio krom han-nacio troviĝas ankaŭ pli ol kvindek nacimalplimultoj. Ĉi tiuj nacimalplimultoj, el kies membroj en malnova Ĉinio iuj eĉ ne kuraĝis konfesi sin membroj de nacimalplimultoj por eviti suferon de malfavora traktado, ĉi-foje sendis siajn amatorajn artistojn aŭ reprezentantojn partopreni la Festivalon. Tio pruvas ĝuste kiel vortoj en unu el la popolkantoj kantitaj de ili: “En ĝardeno de la patrio prospere floras miloj da belaj floroj, kaj la popolanoj de nacimalplimultoj, akirintaj novan vivon, similas al prospere florantaj floroj...”

El la pli ol sepcent ĉiunaciaj amatoraj artistoj partoprenantaj ĉi tiun grandiozan Festivalon iuj estas kamparanoj de la tibeta altebenaĵo, aliaj estas paŝtistoj de la stepoj de Interna Mongolio, triaj estas junaj ĉasistoj el arbaro de la Granda Hing-an-montaro, kvaraj estas fiŝistoj de la bordoj de Usuri-rivero kaj Bakbo-golfo, kvinaj estas laboristoj kaj oficistoj de forstejoj de nord-okcidenta Siĉuan-provinco, sesaj estas laboristoj de nove konstruitaj fabrikoj en nacimalplimultaj regionoj; inter ili troviĝas ankaŭ estroj de popolkomunumoj kaj produktogrupoj. El ili 99 procentoj estas malriĉaj laborantaj popolanoj kaj pli ol 150 personoj estas antaŭirantoj en diversaj frontoj. Ili estas kaj elstaraj produktantoj kaj popolamasa avangardo en literaturo kaj arto.

La temoj prezentitaj en la Festivalo enhavantaj fortan spiriton de la epoko kaj profundajn naciecajn kolorojn, alportis al la scenejoj de la ĉefurbo fortan revolucion etoson kaj sanan freŝecon. Multaj el la programeroj luditaj de la amatoraj artistoj de ĉiuj nacioj estas pri unu komuna elstara temo: prikanti la grandan Kompartion, Prezidanton Maŭ

—la gvidanto de ĉiuj ĉinaj nacioj kaj la grandan familion de la patrio. Estinte kamparanoj, sklavoj aŭ malriĉaj paŝtistoj plene suferantaj en la malnova Ĉinio subpremon, ekspluatadon kaj malfavoran traktadon, nun ili mem verkis kaj prezentis laŭ la propraj spertoj, kaj per diversaj naci-lingvoj ili esprimis sian senliman amon al la Partio, al Prezidanto Maŭ kaj al la patrolando.

Multaj amatoraj artistoj profunde suferis en la malnova Ĉinio kaj kiam ili aperis sur la scenejo la spektantoj tuj ekscitiĝis kaj faris varman aplaudon, aŭdinte iliajn vivhistoriojn, ĉar la fakto mem ke ĉi tiuj “subuloj” kaj “sovaĝuloj” en la malnova socio nun povas aperi kiel mastroj sur la scenejoj de la ĉefurbo, jam klarigas ilian komunan voĉon “Se ne estus la Kompartio, ne estus la nova Ĉinio; se ne estus la Kompartio, ne estus mia hodiaŭo”. Ĉiunaciaj amatoraj artistoj venintaj de la tibeta altebenaĵo, de la stepoj de Interna Mongolio, de Mjaŭ-vilaĝoj de Gujĝoŭ-provinco, de la bordoj de Tongtian-rivero de Kinghaj kaj de multaj aliaj izolitaj altaj montoj kaj arbar-regionoj, per figurriĉa kaj viveca lingvo priskribis la multnombrajn “unuafojajn” kaj sennombrajn “bonegajn” okazintaĵojn en sia vivo kaj esprimis sian grandan volon kaj noblan aspiron klopodi kaj strebi forte antaŭen por prosperiĝo.

Grandnombra apero de bonegaj programeroj mem verkitaj kaj mem prezentitaj de amatoraj artistoj de la nacimalplimultoj estas alia ĉefa karakterizaĵo de la Festivalo.

La verkintoj, kiuj estas samtempe prezentantoj, de multaj el tiuj bonegaj programeroj estas emancipitaj suferintoj kaj laboruloj ĉiam kun odoro de sia hejma tero. Iliaj programeroj karakteriĝas per koncizeco specifa en amatora prezentado, strikta interrilato kun la laborula vivo kaj populareco. Ili prikantis siajn batalojn, liberiĝon kaj novajn atingojn en produktaj frontoj de socialismo. Ili ne nur prezentis temojn de la revolucio de Ĉinio, sed ankaŭ ilin prezentis tre vivece, versimile kaj forte kortuŝis la publikon. Iuj programeroj estas ja laborkantoj, kiujn oni ritme krias dum arbhakado aŭ ŝip-irigado. Iuj dancoj estis kreitaj sur la bazo de movoj de diversaj laboroj. La plejparton de tiaj programeroj oni povas ludi simple per 2-5 personoj ne bezonante scenejajn ekipaĵojn.

El iliaj prezentoj oni povas vidi la vivplene prosperiĝantan batalan vivon de la nacimalplimultaj popolanoj de diversaj regionoj, kaj ankaŭ novajn heroojn en diversaj frontoj. La kontraŭimperiismaj bataloj de ĝing-aj popolanoj ĉe la bordo de Bakbo-golfo, la gajaj kantoj kaj dancoj de divers-naciaj popolkomunumanoj de la Hingianga Ujgura Aŭtonoma Regiono por kune celebri abundan rikolton, raporto de fiŝistoj kaj ĉasistoj de la nacimalplimultoj heĝea kaj olunĉuna apud Usuri-rivero pri ĝojigaj informoj en produkto, kantoj de tibetaj emancipitaj servutuloj pri ilia nova vivo kaj ilia firma volo ĉiam esti singardemaj kontraŭ la klasaj malamikoj — tiuj agitantaj scenoj pri la batala vivo en ĉiuj partoj de la lando aperis unu post alia antaŭ la spektantoj kaj ilin ĉarmis per siaj buntaj koloroj. Kaj tra la prezentoj oni povas imagi al si la solidarecon, progreson kaj prosperon en la regionoj de la nacimalplimultoj de Ĉinio.

Estas pli ĝojige, ke el multaj programeroj propagandantaj socialismon kaj patriotismon aperis serio da eminentaj verkoj prikantantaj heroojn en la reala vivo, ekz. “Heroa Ĉeval-paŝtisto” prezentita de la delegacio de Interna Mongolio kaj “Elekti Re prezentanton” prezentita de la tibeta delegacio estas du el ili. La verkintoj kaj ludantoj de ĉi tiuj programoj prikantas kun plena entuziasmo kaj alta estimo la sinoferan heroaĵon de ĉevalpaŝtisto Naŝun por la kolektivo kaj la noblan moralon de komunistino Nima deveninta de servutulino kaj la amon kaj estimon, kiun al ŝi esprimis ŝiaj samvilaĝanoj. En la programoj ne troviĝas kompleksaj intrigoj, sed la firmaj, modestaj kaj amindaj figuroj de la herooj faris al la spektantoj klaran kaj profundan impreson.

Ĉiam en strikta interligo kun la aktualaj produktoj kaj la centraj laboroj la talentaj amatoraj artistoj verkas kaj ludas programerojn kaj ilin uzas kiel fortajn instrumentojn por instrui la amason, kontraŭbatali la malamikojn kaj antaŭenpuŝi

la produktadon. Ekz. Vej Hiŭmin, ĝuanga juna kantisto el Maŝan-gubernio de Guanghi-regiono, jam mem verkis kaj mem kantis pli ol sepcent popolkantojn de post kiam li likvidis sian analfabetecon antaŭ ok jaroj. El tiuj popolkantoj iuj kuraĝigas la batalvolon de la amaso kontraŭ sekegeco, aliaj esprimas ĝojon de la amaso pri abunda rikolto, triaj propagandas bonojn de lernado kaj kvaraj donas klasan instruon al la amaso. La “Kanto Dediĉita al la Partio” prezentita de li mem en la ĉefurbo estas unu el liaj eminentaj verkoj.

La grandioza festivalo estas denova revuo de la tutlanda agado de revoluciaj literaturo kaj arto en Pekino sekve de la Festivalo de Pekinaj Operoj pri Nuntempaj Temoj en somero de 1964 kaj la eposo de muziko kaj danco “Oriente Ruĝas Sun” dum la nacia festo de 1964. En ĉi tiu grandioza prezentado ne nur manifestiĝis la nacia egalrajteco de politiko de la kompartio kaj la registaro de Ĉinio, sed ankaŭ la prospera disvolviĝo de popolamasaj amatoraj kulturaj laboroj en regionoj de nacimalplimultoj kaj novaj atingoj en revoluciigo, popularigo kaj naciigo de literaturo kaj arto.

La spektantoj de la Festivalo, precipe multaj laboristaj kaj kamparanaj spektantoj, amatoraj aktivuloj kaj profesiaj laborantoj de literaturo kaj arto unuanime laŭdis tion, ke ĉi-foje revoluciaj kantoj kaj dancoj estas prezentitaj de revoluciuloj kaj ke la amatoraj artistoj estas kaj laborkapabluloj kaj plej bonaj laborantoj de literaturo kaj arto. La spektantoj profunde vidas, ke kapabli samtempe kaj labori kaj okupiĝi pri literaturaj kaj artaj agadoj estas granda avantaĝo kaj se ni tenos kaj disvolvos ĉi-tiun avantaĝon, ni do povos funkciigi niajn literaturon kaj arton tiel ke ili ĉiam ligu kaj kune batalu kun la laboranta popolo, ĉiam persistu la orientilon de nia literaturo kaj arto servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj al socialismo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



ĈINIO FORTE RIPROĈIS LA USONAN IMPERIISMON PRO ĜIA DISETENDO DE LA MILITFAJRO EN SUDVJETNAMIO

La 13-an de jan., 1965, la Ĉina Popola Respubliko publikigis deklaron en kiu ĝi forte riproĉis la usonan imperiismon, kiu igis Pak-Ĝong-Hi-

-klikon de Sudkoreio sendi trupojn por partopreni la agresan militon en Sudvjetnamio.

La Deklaro montras, ke la argilaj piedoj de la usona imperiismo dro-nas pli kaj pli profunden en la marĉo de la agresmilito pro la heroa rebato de la sudvjetnamia popolo. De-longe, ĝi ĉiel klopodas treni siajn aliancantojn kaj lakeojn en la militon por fari ĝin internacia. La Pak-Ĝong-Hi-kliko decidis ekspedi trupon de pli ol 2000 homoj por partopreni la militon. Tio estas alia serioza paŝo farita de la usona imperiismo

por detrui la Ĝenevan Interkonsenton, plivastigi la militfajron en Hindoĉinio kaj internaciigi la tian militon. La ĉina registaro opinias, ke la du prezidantoj de la Ĝeneva Konferenco devas rapide alpreni agadon por malhelpi pligraviĝon de la situacio. Se la usona imperiismo daŭrigos la krimagon plivastigi la agresan militon en Sudvjetnamio kaj eĉ klopodos fari ĝin internacia, tiam la ĉinaj registaro kaj popolo ne povos ne pluapaŝe konsideri sian plenumendan respondecon en defendo de la paco en tiu regiono.

ĈIUJ NACIOJ DE ĈINIO PRIKANTAS SOCIALISMON



KANTO PRI ELEKTRAJ LAMPOJ (Kantas reprezentantinoj el Mjaŭ-nacio)
Foto de Ĝang Mej

BUJI-A KNABINO LERNAS ERPADON (Kantas reprezentantino el Buji-nacio pri ĝojo de reveninta juna intelektulo en kamplaboro)

Foto de Ĝang Mej



POPOLKOMUNUMO ESTAS ORPONTO (Kantas reprezentantino el Manĉu-nacio)

Foto de Ding Gjun



ORIENTE RUĜAS SUN' (horaĵo de ĉiuj nacioj de Ĉinio)




Foto de Jen Šijin



FESTO DE ABUNDA RIKOLTO (danco de Ujgur-nacio, Hingiang) Foto de Liaŭ Ĝigen

RUGĜAS LA DROGAJ FRUKTOJ (kanto-danco de Huj-nacio, Ninghia)


Foto de Vu Ĝongge





KANTO PRI MODELA KOMUNUMANO (viro-virina popola interkantado de Ji-nacio, Siĉuan-provinco)

Foto de Liaŭ Ĝigen





RIĈA RIKOLTO (tibeta danco)

Foto de Vu Ĝongg

SUBTENO AL KANGOLANDO (Leopoldvil) (horaĵo de ĉiuj nacioj de Guanghi)

Foto de Liaŭ Ĝigen





AKVOPORTADO KONTRAŬ SEKEGECO (danco de Kore-nacio, Gilin-provinco)

Foto de Vu Gongge



ELEKTRAJN LAMPOJN NI EKHAVAS (danco de Ovenke-nacio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio)

Foto de Li Lanjing



LA KORO DE LA LANDLIMA POPOLO ĈIAM SIN DIREKTAS AL LA PARTIO
(kolektiva danco de ĉiuj nacioj de Junnan-provinco)

Foto de Liaŭ Ĝigen



SUNO RIDAS EL LA KORO (popo-
anto de Tuĝja-nacio, Hubej-provinco)

Foto de Liaŭ Ĝigen

FESTO PRO LA NOVA DOMO (danco de Li-nacio, Guangdong-provinco)

Foto de Liaŭ Ĝigen





FLORO EN LA EKSPERIMENTA KAMPO
(Kantas reprezentantoj
el Baj-nacio)

Foto de Ding Gjun

NIA PAŝTEJO (Kanto de reprezentantoj el ĥalhaza nacio)

Foto de Ĝang Mej



ORDINARA LABORULO

EN diversaj fabrikoj kaj minejoj de la nova Ĉinio, vastaj kadroj daŭrigas la bonan tradicion formitan dum la longdaŭra revolucia batalo, persistante partoprenadi en fizikaj laboroj kune kun la laboristoj kiel ordinara laboruloj.

Antaŭ ŝtalrafinaĵoj, iliaj ŝvitoplennaj vizaĝoj ruĝas de la inkandeskaj flamoj; ĉe alt-rapide turniĝantaj ilmaŝinoj disflugas fajreroj sub iliaj manoj; en laborejoj de ŝpinado kaj teksado ili faras kontrolan ĉirkaŭiradon, sekvante malnovajn laboristojn, por ke la maŝinoj bone funkcii; en liberĉiela minejo ili batalas kontraŭ la rokoj, dum la musono kaj suno pentras sur iliajn vizaĝojn la nigrebrunan koloron de ordinara laborulo.

Ĉio ĉi tio facile nin rememorigas pri la “glora ŝovelilo”, per kiu Prezidanto Maŭ laboris kune kun centoj kaj miloj da konstruantoj sur la konstruteren de la Dektri-maŭzolea Akvorezervejo; pri la “portvektado de Ĝu De”, per kiu ĉefkomandanto Ĝu De portis ŝarĝon kune kun la soldatoj de la Ruĝa Armeo sur Ginggang-monto; pri la facila, ritma zumado de radŝpiniloj el la kavernodomoj de Jan-an loĝataj de ŝtataj oficistoj, en malfrua nokto dum la malfacilaj jaroj de la Kontraŭ-japana Rezistmilito.

* * *

La Anŝan-a Ferŝtala Kompanio estas la plej granda Metalurgia Uzino de Ĉinio. La sekretario de la partia komitato de ĝia tubgisejo, Meng Kingdi, ĉiam persistis regule partopreni en fizika laboro, kaj loĝadis en komuna loĝdomo por ordinara laboristoj dum la lastaj sep jaroj post kiam li prenis sur sin tiun okupon. Tio ebligis al li ĉiam konservi la karakterizaĵojn de laboristo, havi intimajn pensojn kaj sentojn al la laboristoj, kaj ĝustatempe solvi iliajn problemojn en la ĉiutaga vivo kaj produktado.

Foje, dum la plej varmaj tagoj de somero, ĉirkaŭ la varmega sabloforigejo de la gisejo, la temperaturo abrupte altiĝis ĝis pli ol sesdek gradoj. La lipoj kreviĝis kaj la lango doloris, kaj iuj laboristoj devis peti forpermeson pro kapturigo.

Ĝuste en tiu peniga tempo Meng Kingdi alvenis kaj mem partoprenis la malfacilan laboron tie. Ju pli peniga estis la laboro, des pli ardis lia koro: ni nepre ne lasos la laboristajn fratojn suferadi de tia bakado.

Kaj sekve Meng Kingdi firme decidis elkrei sabloforigan maŝinon, por ke la laboristoj ne tiom suferu de la bakado. Eĉ en dimanĉo li ne ripozis, sed projektadis kune kun laboristoj kaj teknikistoj. Por fari tian maŝinon li mem tornis, pene marteladis kaj faris aliajn pezajn laborojn.

Post pluraj malsukcesoj kaj eksperimentoj, fine du sabloforigaj maŝinoj estis sukcese fabrikitaj. Se oni nur premetas la ŝaltilon ok metrojn for de la maŝinoj, ili tuj ekfunkcias, forigante la varmegan sablon de sur la ĵus gisitaj ruĝaj tuboj. De tiam la laboristoj ne plu suferas varmegon en laborado.

La agado de Meng Kingdi entuziasmigis la laboristojn por produktado. Ili diris: “La kadroj tiom zorgas pri ni laboristoj, ni do devas labori ankoraŭ pli energie en produktado. Se la kadroj kapablas iri en la maron, do ni povas kapti drakon!”

* * *

Partopreni en fizikaj laboroj, eltrovi problemojn kaj plibonigi la produktadon, jen estas la deziro de vastaj kadroj en diversaj fabrikoj kaj minejoj. Tio ĉi ankaŭ estas impulso por partopreno al fizikaj laboroj.

Ĝuang Hinguang, la vicdirektoro kaj ĉefinĝeniero de la Unua Kotona Ŝpinteksejo de Ŝanhajo, regule laboradis ĉe la kvara kotonlivera maŝino kiel ordinara deĵoranto. Foje, iu laboristo diris al li dum laboro, ke pro la neracia strukturo de la kotonlivera maŝino, oni devas pene sin ŝovi internen kaj eksteren de la kestegoj por ilin purigi.

Ĝuang Hinguang sentis, ke la laboristo kvazaŭ kritikis lin mem. Li pensis: “Pro unufoja fuŝprojekto de inĝeniero, la laboristoj devas penlabori jarojn post jaroj.” Kvankam tiu kotonliverilo estas projektita ne de li mem, tamen en la lastaj jaroj li faris ne malmultajn projektojn por plibonigo de la maŝinoj, kaj sankciis ne malmultajn projektojn de aliaj, sed li ne ĉiam bone konsideris ĉu ili estas oportunaj por la manipulado de la laboristoj.

Li elmetis la taskon pri plibonigo de la kotonlivera maŝino. Kiam la teknikistoj donis al li siajn projektojn por ke li ilin kontrolu kaj sankciu, li pensis ke tiu ĉi sankcirajto antaŭ ĉio apartenas al la laboristoj, kaj oni devas unue aŭskulti iliajn opiniojn.

La projektoj estis donitaj al la laboristoj por diskuto. Post fervora diskutado la laboristoj prezentis pli ol cent tridek opiniojn kaj proponojn por plibonigoj kaj renovigoj inkluzive de punktoj pri kiuj la teknikistoj antaŭe tute ne pripensis. Dank' al la perfektigo kaj plibonigo fare de la laboristoj, la projekto pli raciigis. Malpliigis la disfluganta kotonlanugo dum la funkciado de la plibonigita kotonlivera maŝino, kaj oni povas facile ĝin purigi.

En la fabrikoj kaj minejoj de la nova Ĉinio, la partopreno de kadroj en fizikaj laboroj jam fariĝis regula afero. Ili estas kaj organizantoj de produktado kaj ordinaraj laboruloj. Ili ekkomprenis el siaj propraj spertoj ke nur dank' al tio oni povas sin purigi de la polvo de burokratismo kaj efektivi la grandan idealon de komunismo, nome iom post iom nuligi la diferencon inter mensaj kaj fizikaj laboroj, formiĝantan dum miloj da jaroj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



DU PLIAJ USON-ĈIANG-AJ AVIADILLOJ ESTAS FALIGITAJ

La aerarmeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo faligis en nia teritoria aero unu militan senhoman aviadilon de Usono por altaera rekognoskado je la 2-a kaj unu de Usono fabrikitan U-2 rekognoskan aeroplanon de la Ĉiang-Kajŝeka bando je la 10-a de jan., 1965. Antaŭe la aerarmeo de ĈPLA jam sinsekve faligis aliajn 3 U-2-aeroplanojn.

SERVUTULO FARIĜIS GVIDANTA FUNKCIULO

En la tuta regiono de Tibeto estas pli ol mil tibetaj kadroj kiuj prenas sur sin la gvidan oficon en diversrangaj organizaĵoj de la Partio kaj Registaro. El la administraj estroj de la pli ol 70 gubernioj kaj pli ol 440 distriktoj en la tuta regiono 87% estas tibetanoj, ne malmulte da homoj oficas kiel gvidantoj de la gubernioj kaj subregionoj.

Tiuj tibetaj kadroj plejparte estis servutuloj kaj sklavoj en la pasinteco. Post promociigo al la gvidantaj postenoj ili estas elprovitaj kaj harditaj en la laboroj. Ili estas multe amataj de la popolamaso kaj fariĝis la kernaj fortoj por la registaro en plenumado de la taskoj.



FORMIĜO PER EKSPLODO

La esploristo de la Dinamika Instituto de la Ĉina Akademio de

Sciencoj faras esploradon, ekde 1960, kunlabore kun laboristoj kaj teknikistoj, pri la formiĝo per eksplodo, t. e., nova tekniko por rapide formi ĉiuspecajn maŝinpartojn el metalaj platoj en konkava muldilo. utiligante la impetajn ondojn kaŭzigitajn de en-akva eksplodo de dinamito. Ili akiris la unuapaŝan sukceson en 1964 post centoj kaj miloj da fojoj da provado. Nun tiu ĉi nova tekniko jam komencis esti disvastigata en la produktado en Ĉinio.

PLI OL MIL SPECOJ DA ŜTALPRODUKTOJ

Antaŭ la Liberiĝo, Pekino estis urbo kiu povis produkti nur feron sed ne ŝtalon. Nun ĝi jam povas produkti pli ol mil specojn da ŝtaloj. En 1964 sola, estis sukcese provfabrikitaj pli ol 400 specoj. Inter ili sin trovas multaj bonkvalitaj ŝtaloj kaj ŝtalalojoj.

INDUSTRIO DE EKIPAĴOJ POR ŜTONOLEA PRODUKTO

Reto de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj por produktado de ekipaĵoj por ŝtonolea industrio estas unuapaŝe konstruita en Ĉinio. Nuntempe, diversaj maŝinoj, granda-tipaj olerafinaj turoj, reakciiloj k. a. novaj ŝtonoleo-rafinaj ekipaĵoj bezonataj en petrolominejoj jam povas esti produktitaj en Ĉinio kaj ankaŭ kompletoj de modernaj ekipaĵoj por olerafinejoj povas esti provizitaj de Ĉinio. En 1963, la totala kvanto de olerafina maŝinaro liverita pli multiĝis je pli ol 60% kompare kun tiu de 1962; en la unuaj ok monatoj de 1964 la totala kvanto de elproduktitaj ekipaĵoj pli multas unuoble ol tiu de la sama periodo de 1963. Tio ebligas ke Ĉinio jam povas produkti sufiĉan ŝtonoleon

por ĝenerale kontentigi siajn bezonojn.

NOVAJ FABRIKOJ EN TIBETO

En Tibeto, kie oni ne povis fari eĉ unu ŝraŭbon antaŭ la Liberiĝo, nun stariĝis jam pli ol kvindek fabrikoj mezgrandaj kaj malgrandaj, kiuj estas plejparte konstruitaj dum la lastaj kvin jaroj. En Lhasa jam funkcias pli ol 20 nove konstruitaj fabrikoj, el kiuj troviĝas modernaj fabrikoj de cemento, aŭtoriparejo, riparejo de maŝinoj vojkonstruaj, hidraŭlika elektrejo, ledotanejo, muelejo, olepreparejo k. a. Ankaŭ en aliaj relative grandaj urboj establiĝis etaj fabrikoj de agrikulturiloj, oleelpremado, prilaborado al manĝaĵoj, brikoj, tegoloj k. a. La unua generacio de la tibeta laboristaro jam elkreskis. En la tuta regiono estas nun 20,000 laboristoj, el kiuj iuj eĉ fariĝis gvidantaj funkciuloj de fabrikoj.



KRANIO DE SIMIOHOMO NOVE MALKOVRIĜA

Ĉinaj sciencaj laborantoj malkovris kranion de simiohomo ĉe Gongvangling de Lantian-gubernio, 60 kilometrojn sudoriente de Hian, Ŝenhi-provinco. Tiu ĉi estas la sola simiohoma kranio nun konservata en Ĉinio. La alia kranio kiun Ĉinio malkovris antaŭe ĉe Ĝoukoŭdian, jam malaperis post kiam la usonanoj ĝin forprenis.

Laŭ la unuapaŝa juĝo farita pri la tempo de stratumo, tiu ĉi kranio povas esti de antaŭ 5-600,000 jaroj, do iom pli frua ol la simiohoma fosilio de Ĝoukoŭdian.

En Hejmo de Unu Komunumano

PASINTJARE, en la sezono de aŭtuna rikolto mi havis okazon viziti la familion de iu komunumano en la antaŭurbo de Pekino.

En la malnova Ĉinio, en la kamparo de etkamparana ekonomio, familio estis fundamento kaj ankaŭ miniaturo de feŭdisma socio; sed nun, en la kamparaj komunumoj de la nova Ĉinio ĝi fariĝis helpa ĉelo de granda kolektiva familio. La anoj de ĉiu familio estas ankaŭ anoj de komunumo. En la ĉiutaga vivo formo de familio ankoraŭ estas tenata, sed sur la nova ekonomia bazo ĝi akiris novan sencon.

FAMILIO KUN TRI GENERACIOJ

La familio, kiun mi vizitis, estas familio de Ŝi Ĝengiang, ano de Mejŝikoŭ-produktogrupo de Hiaŭtun-produktobrigado de Lugoŭkiaŭ-komunumo.

Frumatene, enirante en la hejmon de Ŝi Ĝengiang mi vidis lian maljunan patron ĝuanta sunan kareson antaŭ fenestro. Apud la maljunulo kvar aŭ kvin knaboj ludis pelante unu la alian, kaj pro tio en la vasta kaj pura korto ofte eksplodis naivaj ridoj.

Sciiginte pri mia celo la maljunulo diris al mi, ke liaj du filoj kaj du bofilinoj iris al la produktogrupo partopreni kolektivan laboron. Por ke ili koncentrigu siajn fortojn por plibonigi la kolektivan produktadon li restis hejme kaj prizorgis siajn nepojn.

Sed restante hejme la diligenta avo ne forgesis kontribui sian forton al la kolektiva produktado. Aktive respondante la alvokon de la produktogrupo pri bredado de porkoj kaj kolektado de sterko, krom prizorgi la etajn nepojn li bredas ankaŭ du grasajn porkojn. “Ĉiuj ni komunumanoj,” diris la avo, “devas ĉiam pripensi la kolektivon. Nur se la kolektiva produkto pliboniĝas, niaj malgrandaj familioj povas vivi pli feliĉe.”

REMEMORO ĈE MANĜTABLO

Je la horo por tagmanĝo, la domo tuj pleniĝas de ĝojo kaj vigeleco.

De antaŭ la pordo aŭdiĝas gaja babilo. Jen envenas la du mastrinoj de la familio — la bofratinoj Vang Fenglan kaj Caŭ Ĝianmej. Ili tuj iris en la kuirejon por preparado de tagmanĝaĵo.

Poste revenis unu post la alia ankaŭ du filoj, la pli aĝa Ŝi Ĝengiang kaj la malpli aĝa Ŝi Ĝenhe kiuj estas la ĉefaj laborkapabluloj en la familio. Ĝengiang estas veturigisto de la produktogrupo, kaj Ĝenhe, evidente, energia junulo.

Estis alportitaj sur la tablon vaporantaj tagmanĝaĵoj: bovlo da ovosaŭĉaĵo, du pladoj da legomaĵoj kaj la ĉefmanĝaĵo — vermiĉelo. La gastemaj mastroj invitis min manĝi kune kun ili.

Dum manĝado mi interparolis kun Ŝi Ĝengiang pri la vivo de ilia familio antaŭ la Liberiĝo kaj tio emociis lin.

Li diris al mi, ke antaŭ la Liberiĝo ilia familio havis nur kvin muojn da agro kaj kadukan triĉambran terdomon. Kiam li estis dekdu-jara, pro malriĉo, lia patro estis devigita sendi lin servi al aliu, kaj en tiel malgranda aĝo li jam devis sin vivteni per vendo de propra laborforto. En lia dudekdu-jara aĝo lia hejmloko suferis katastrofon kaj li estis maldungita. Li devis forlasi sian hejmlokon kaj formigri sola por serĉi vivtenan rimedon. En la sekvanta jaro lia patrino mortis en malriĉo kaj malsano. Sed pro malproksima distanco li ne povis

La avo kaj siaj genepoj.



hejmenreveni por aranĝi la enterigon. Post la Liberiĝo, la bienula klaso estis renversita, la popola registaro distribuis al ilia familio 9 muojn da agro kaj la vivo de ilia familio ricevis garantion, kaj nur tiam li povis hejmenreveni kaj vivi feliĉe kun la parenĉaro.

**SE L' GRANDA RIVERO AKVON ENTENAS,
LA BRANĈOJ DE ĜI AKVOPLENAS**

Kiam nia parolo ektuŝis la vivon de lia familio post la Liberiĝo la mastro montris al mi sian loĝejon kun fiero kaj prezentis al mi ĝian historion.

La tuta familio de Ŝi Ĝengiang kunpreme loĝis en la kaduka terdomo triĉambra antaŭ kiam ĝi partoprenis agrikulturan kooperativon. En la vintro de 1954, ili volonte partoprenis agrikulturan koope-

rativon, kaj ĝuste en ĉi tiu jaro ĉiuj kooperativanoj de ilia vilaĝo unu-anime kaj akorde konstruis en la sudo kaj nordo de la vilaĝo du irigaciajn kanaletojn kun longeco de pli ol dek lioj, alkondukis akvon de Jongding-rivero kaj faris la plejparton de siaj kampoj irigaciata, vastigis la areon de siaj legomkam-

poj kaj per tio multe grandigis la enspezojn de la kooperativanoj. Du jarojn poste ilia familio jam havis sumon da ŝparmono kaj sub la helpo de la kooperativo ilia familio unuafoje konstruis kvar novajn ĉambrojn kun tegoltegmento. Post la establiĝo de la popolkomunumo la produktogrupo akiris elektrajn ekipaĵojn, konstruis tri elektrajn putojn kaj faris sian tutan kamparon irigaciata. Sekve la produktokvanto de legomoj kaj grenoj altiĝas ĉiujare kaj la vivstato de la popolkomunumanoj pli kaj pli boniĝas. En la jaro 1962 per elŝparita mono ilia familio denove konstruis kvarĉambran novan domon kun brikaj muroj kaj la pli junaj frato kaj bofratino transloĝiĝis en ĝin.

Parolanta ĝis ĉi tie Ŝi Ĝengiang signifoplene diris: "El la sperto de vivo ni ekkomprenis la signifon de la proverbo, 'Se l' granda rivero akvon entenas, la branĉoj de ĝi akvoplenigas', kaj tra la vojo de kolektivigo ni vidas la perspektivon de la socialisma nova kamparo."

Kiam mi kaj Ŝi Ĝengiang eniris la loĝejon de lia malpliĝa frato, lia bofratino Caŭ Gianmej estis mam-nutranta sian infanon. La senluksa mastrino kun feliĉa aspekto diris al mi, ke ĝi estas ŝia tria infano. Poste ŝi eklaŭdis sian pliĝan bofratinon. Ŝi diris, ke ĉiu-foje, kiam ŝi akuŝis, ŝi ricevis bonan prizorgon de sia pliĝa bofratino. Ili kunvivas kiel fratinoj kaj ĉiam bone prizorgas unu la alian. Ĉiumonate ili ambaŭ laboras po proksimume 25 tagoj kaj ripozas po 1 tago post 7- aŭ 8-taga laboro. Ili kune mastrumas la hejmajn aferojn, kaj kunvivas tre kontente.

"Ili kunvivas tre solidarece kaj tiel bone aranĝas la hejman vivon ke ni ambaŭ fratinoj povas koncentrigi niajn zorgojn kaj fortojn por plibonigi la kolektivan produkton," intermetis Ŝi Ĝengiang.


Ja estas tiel. Post kiam Ŝi Ĝengiang kaj lia frato partoprenis la kooperativon ili ĉiam laboras plenenergie en la kolektiva produkt-

to. Kiel veturisto de la produktogrupo, Ŝi Ĝengiang ĉiam akurate transportis legomojn en urbon spite al ventoj kaj pluvoj, kaj en tri sinsekvaj jaroj li estis elektita kiel eminenta komunumano. Kaj lia frato estis elektita kiel eminenta junulo. En 1963 la kvar laborkapabluloj en ilia familio plenumis entute pli ol 1,100 labortagojn kaj laŭ jarfina kalkulo de la produktogrupo la tuta enspezo de la familio sumiĝis je pli ol du mil juanoj. Post la dekalkulo de la ricevita antaŭpago ilia familio ricevis netan sumon de pli ol 950 juanoj. La familianoj kunsidis kaj decidis, laŭ principo de ŝparema mastrumado, aĉeti biciklon kaj kudromaŝinon kaj deponi la restan sumon en bankon.

Mi adiaŭis la familion kaj sur la revena vojo mi ekmemoris diron de iu fremdlanda amiko: "Malnova, sed nove emerganta Ĉinio". Ĉu mi ne vidis tute novan esencon en la malnova formo de ĉina familio?



La tuta familio.



Liang Hiaŭmu kaj ŝia patrino.

LA SPORTISTINOJ DE DU GENERACIOJ

ĈEN HJUNHUA

MIA plejaĝa filino Liang Hiaŭmu estas fame konata volanistino de Ĉinio.

En la malnova Ĉinio ankaŭ mi estis sportistino. Sed malsamaj estas niaj tempoj, kaj malsamaj estas niaj travivaĵoj.

Mi rigardis la koloran dokumentan filmon pri la Unua Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj. Vidante la scenon ke Hiaŭmu kiel reprezentanto de la ĉina teamo serioze surpaŝis la podion por ricevi la ĉampionan premion de la volana konkurso por virinoj kaj en jubila aplaŭdado de la ĉeestantoj la ruĝa kvinstela nacia standardo malrapide hisiĝis, ankaŭ mi kaj aliaj spektatoroj aplaŭdadis kun entuziasmo. Samtempe larmoj nedeteneble elverŝiĝis el miaj okuloj kaj vekigis mia memoro pri multe da pasintaj aferoj.

Antaŭ pli ol dudek jaroj mi kaj mia patro kune revenis de Indonezio al la patrolando. Mi eniris la Virinan Mezlernejon de Guangdong-provinco en Kantono por daŭrigi mian lernadon. Mi tre ŝatis partopreni sportajn agadojn. Tiam, mi eĉ pensis naive ke mi klopodos min ekzercadi por krei novan rekordon en sportkunveno kaj tiel glorigi la patrolandon!

En majo de 1937, kiam mi estis baldaŭ fariĝonta abiturientino, mi partoprenis la "14-an Sportkunvenon de Guangdong-provinco" en la nomo de mia lernejo. En tiu sportkunveno, mi distingiĝis kiel membro de la ĉampiona teamo de la korbopilka konkurso por virinoj kaj de la ĉampiona teamo de la volebala konkurso por virinoj, kaj krome mi gajnis la ĉampionecon en la B-grupa turniro de la kuglegojeto por virinoj. Tiam en ĵurnaloj de Kantono oni publikigis mian portreton por min flati. Sed en la malnova socio la sportistinoj estis fakte nur ornamajo de la reakcia regantaro. La famiĝintaj sportistinoj tuj fariĝis amuzaj objektoj persekutataj de la militaristoj kaj burokratoj. Ĝuste tiam disportiĝis la tragika historio de Jang Hiukjong, la landa ĉampiono de naĝado por virinoj kiu tuj post la ĉampioniĝo estis forprenita de iu militaristo en Siĉuan-provinco kiel konkubino. Tio pezis sur mia koro pli ol plumba globo. Finfine mi devis forlasi la idealon, kiu iam kuraĝigis min krei novan rekordon por glorigi la patrion.

En 1938, post kiam mi abiturientiĝis, senbrue mi forlasis la patrolandon kaj refoje veturis al Indonezio.


Post dudek jaroj, en julio de 1958, mi kaj mia edzo revenis de fremdlando en la liberigitan patruon kune kun niaj kvar infanoj. Hiaŭmu eniris la Unuan Mezlernejon de Foŝan, Guangdong-provinco. Rimarkinte ŝian fortan inklinon al volanludo, la lernejo zorgeme edukis ŝin en tiu sporto kaj poste sendis ŝin lerni en la Kantona Instituto de Fizika Kulturo.

Sed mia dolora travivaĵo min maltrankviligis pro la decido de Hiaŭmu preni gimnastikon kaj sporton kiel sian lernobjekton. Mi eĉ multfoje veturis al la instituto kune kun mia edzo por koni la lernadon de la gestudentoj kaj informiĝi pri ilia estonteco. Faktoj pruvis ke la fizika kulturo de la nova Ĉinio estas tute diferenca de tiu de la malnova Ĉinio kaj mian filinon certe ne trafos la tragika sorto de la antaŭaj sportistinoj.

En la pasinto mi neniam rakontis al Hiaŭmu pri mia travivaĵo de sportistino. Mi ne volis tion preparoli — ho, kiom dolore estis por mi! En la dua jaro de ŝia lernado en la instituto ŝi gajnis la honoran titolon de Unuagrada Sportisto. Iu dimanĉe kiam ŝi hejmen revenis kaj informis min pri la novaĵo kun ĝojego, mi ne plu povis min deteni de forta emociiĝo. Mi malfermis keston kaj el ĝi prenis la flaviĝintan sportistan ciferotukon, kiun mi portis en la provinca sportkunveno kaj konservis ĉe mi jam pli ol dudek jarojn. La unuan fojon mi rakontis al Hiaŭmu pri multaj neimageblaj friponaĵoj okazintaj en la tiamaj sportkunvenoj, kiujn mi vidis propraokule kaj aŭdis propraorele, kaj pri miaj propraj kordoloraj travivaĵoj. Per tio mi montris al ŝi, kiel feliĉe ŝi vivas hodiaŭ sub la zorgo de la Partio. Mi admonis ŝin, ke ŝi nepre sekvu la direkton de la Partio kaj kreu elstaran rekordon por la patrolando.

Per senĉesa instruado kaj helpado la Partio levis la politikan konscion de Hiaŭmu kaj honore ŝi fariĝis membro de la Komunista Junulara Ligo. Dank' al la senlaca instruado de la Partio Hiaŭmu fariĝis malcedema. Ŝi diligente sin ekzercadis por levi sian arton kaj finfine fariĝis la landa ĉampiono de la unuopa kaj duopa turniroj de volanludo por virinoj, kaj gajnis honoron en la internacia sporta tereno.

Informiĝinte ke Hiaŭmu veturos al Jakarta por partopreni la Unuan Sportkunvenon de la



Liang Hiaŭmu ludas volanon tiom rapide, forte kaj lerte.

Nove Emerĝantaj Fortoj, forte emociiĝis nia tuta familio. La patro de Hiaŭmu diris al mi: “Jen venas la horo por fini vian bedaŭron! Via bela sonĝo ja realiĝas per nia Hiaŭmu, ĉu ne?”

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



450,000 KURACISTOJ KAJ FLEGISTOJ

Dum la pasintaj 15 jaroj, Ĉinio elkulturis 450,000 kuracistojn kaj flegistojn, inter kiuj 120,000 diplomigis el la medicinaj kolegioj kaj aliaj el pli ol 200 medicinaj lernejoj. Nun en ĉiuj provincoj kaj naci-malplimultaj regionoj de Ĉinio, escepte de Tibeto, jam fondiĝis

unu aŭ kelkaj medicinaj kolegioj. Statistiko montras ke 90,000 gestudentoj ricevas nun medicinan edukon en tiuj kolegioj kaj iliaj dependaj hospitaloj. Tiu ĉi nombro egalas okoblon de la plej altnombra totalo de medicinaj studentoj en 1947 antaŭ la Liberiĝo.

AMASE ELDONIĜIS SCIENCAJ LIBROJ KAJ GAZETOJ

La Pekina Scienca Eldonejo, dum la dek jaroj post sia fondiĝo, eldonis pli ol 3000 librojn kaj periodaĵojn de sciencoj. La kvanto de ilia

distribuado atingis pli ol 43,000,000 ekzemplerojn. Inter tiuj eldonaĵoj estas fakaj verkoj, disertaĵoj, materialoj pri esplorado, bildoj kaj desegnaĵoj, krom verkoj pri sciencaj atingaĵoj eksterlandaj.

GEOMAGNETA MEZURO

Ciferojn pri geomagnetismo ĉinaj sciencaj laborantoj mezurakiris je 6300 metroj super la marnivelo sur la monto Ĝolmo-lungma en Tibeto, kio estas la plejalta loko sur la tero en la monda historio de geomagneta mezurado.

RAKONTO PRI PAPERRO KAJ SKRIBILOJ

LA Ĉina Popola Liberiga Armeo estas ne nur trupo ĉiam venkanta, sed ankaŭ trupo ĉiam sin kleriganta. Frue en la malfacilaj jaroj de la komenca periodo de la Ruĝa Armeo tia tradicio jam stariĝis. Ĉi tie ni rakontas al vi kiel la militistoj de iu roto de la Popola Liberiga Armeo persistis en sinklerigo dum la malfacila periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

La jaro 1942 estis la kvina jaro de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo. Tiam la popolo de la liberigitaj regionoj, gvidata de la Ĉina Komunista Partio, estis en la plej malfacila stadio. La atakoj de la japanaj invadantoj al la liberigitaj regionoj, kune kun la sieĝado kaj blokado fare de la reakcia Kuomintang-kliko igis la armeon kaj popolon de la liberigitaj regionoj multe suferi de ekstreme grandaj malfaciloj. Tie ne nur mankis manĝaĵoj kaj vestoj, sed eĉ papero kaj skribiloj estis malfacile haveblaj.

Sed la armeo kaj popolo de la liberigitaj regionoj ne estis timigitaj de la malfacilaĵoj. La batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, sub la gvidado de la Partio, firme tenis la principon sin apogi sur siaj propraj fortoj kaj sin provizi per siaj produktaĵoj. Ili ellernis ne nur terkulturadon, porkobredadon, ŝafopaŝtadon, sed ankaŭ ŝpinadon kaj ŝtrumpotrikadon. Sekve de la granda disvolviĝo de produkto, multaj malfaciloj estis venkitaj. Tamen, tiutempe, skribiloj estis ankoraŭ ne produktiblaj en la liberigitaj regionoj; povis produktiĝi nur maldelikata papero nigreflava, kaj eĉ tia papero ne povis produktiĝi multe. Oni devis limigi ĝian uzadon en oficejaj laboroj kaj presado de ĵurnaloj interne de la armeo. Sekve la papero kaj skribiloj bezonataj de la diversaj rotoj por sinklerigo venis ĉefe de la malamiko per militakiro. Sed, ĉar la soldatoj de la malamiko, kiel oni scias, nek legis nek skribis, tial ofte okazis, ke atakpreninte unu fortikigitan punkton de la malamikoj ni tamen povis trovi tie neniom da papero kaj skribiloj. Eĉ se iuj militkaptitaj soldatoj okaze havis kraĵonon, ni tamen ne povis ĝin forpreni; ĉar tion malpermesis la disciplino de la Popola Liberiga Armeo.

Tiam en nia roto nur la juna skribisto havis kompletan skribilaron. Eĉ ĝi konsistis nur el unu peniko, unu kraĵono kaj malgranda rulaĵo da papero. Tiuj tri objektoj estis juveloj por li. La du skribilojn li ĉiam kaŝis en sia sino; la malgranda rulaĵo da papero estis eĉ pli trezora: se ekpluvis dum militiro, li tuj envolvis ĝin kiel bebon per peco da vakstolo kaj vestoj.

La deziro de la militistoj por lernado de politiko kaj kulturo estis tre arda, sed mankis papero kaj skribiloj. Kion fari?

Tiutempe tiu taĉmento agadis en montoza regiono de norda Ĉinio. En la montaro kreskis pinarboj kaj betuloj. Foje iu batalanto eltrovis, ke betuŝelo povas esti utiligata por anstataŭi paperon. La novaĵo tuj disvastiĝis, kaj la armeanoj konkure deŝiris betuŝelojn, kaj faris el ili notlibretojn por lernado. Poste iuj armeanoj iniciatis fari plumojn el uzitaj kuglingoj.

Tamen la uzitaj kuglingoj devis esti transdonitaj al la supera instanco por reprodukti novajn kartoĉojn, kaj cetere, tiaj plumoj ne tre taŭgis por skribi sur kruda papero kaj betuŝelo. La batalantoj preferis uzi kraĵonon.

Poste iu batalanto el la roto sin alivestis civilulo, estis sendita al la regiono okupata de la malamikoj por aĉeti kraĵonojn spite al multaj malfaciloj.

Kiam li revenis portante kun si kraĵonojn, ĉiuj ekĝojegis, kuris en la rotosidejon kaj vidis tie, ke la politika direktoro estis tranĉdividanta ĉiun kraĵonon en du pecojn. Li diris al la batalantoj: "Kamaradoj, ĉifoje ni sukcesis aĉeti ja ne malmulte da kraĵonoj, tiom, ke ĉiu el vi povas ricevi duonpecon. Prenu ilin kaj uzu ŝpare."

Ekde tiam ĉiu armeano de la roto havis duonon da kraĵono kaj neniu malkontentis. Por ŝpari la kraĵonon ĉiu faris ankaŭ lignan "skribilon", kiu, tre pintigita, estis portata en la poŝo kune kun la duono da kraĵono. Lernante novajn vortojn en kleriga kurso, ili unue desegnadis ĉiun vorton surtere per la ligna skribilo kaj poste, bone ekzercite, definitive skribis la vortojn en sian kajeron el betuŝelo.

Ĝuste tiamaniere la batalantoj de la roto de la Popola Liberiga Armeo likvidis sian analfabetecon per la duono da kraĵono kaj ligna skribilo.



SUR UNU SAMA FRONTO BATALAS LA AZIAJ KAJ AFRIKAJ VERKISTOJ

— Notoj pri la Forumo pri Azi-Afrika Literaturo —

“**K**AMARADOJ kaj amikoj! Estas senbezone diri ‘Ĝis revido’ inter ni.....” parolis la ĉina verkisto Liu Bajju al la aziaj kaj afrikaj verkistoj en la adiaŭa bankedo tostante kun plena frateco kaj bedaŭro pro la disiĝo, kaj salutis la kontentigan finiĝon de la Forumo pri Azi-Afrika Literaturo.

Tiel kortuŝa estis la atmosfero, ke ankaŭ la aliaj ĉeestantaj verkistoj el Azio kaj Afriko sentis bedaŭron pro disiĝo.

La komunaj sorto kaj deziro ne nur firme kunigis la popolojn de la kontinentoj Azio kaj Afriko, sed ankaŭ vicigis la popolajn verkistojn de tiuj regionoj sur unu saman batalfronton.

Kelkajn tagojn antaŭ la adiaŭa bankedo, en decembro, 1964, okazis en Pekino, la Forumo pri Azi-Afrika Literaturo, kiun partoprenis verkistoj el naŭ landoj en Azio kaj Afriko, nome, Kamboĝo, Kameruno, Cejlono, Indonezio, Japanio, Sudano, Tajlando, Zimbabveo kaj Ĉinio.

Tiuj verkistoj ĝoje kunvenis kaj intime interparolis pri la disvolviĝo kaj batalrolo de la azi-

afrika literaturo en la ŝtormo de revolucio sur tiuj du kontinentoj, kaj ĵetis rigardon al la pli brila perspektivo de la azi-afrika literaturo.

Dum jarcentoj, la popoloj de multaj landoj en Azio kaj Afriko, ege suferis de la sklavigo kaj subpremado fare de imperiismo kaj koloniismo. Nun la azi-afrikaj popoloj jam vekigis kaj stariĝis. Tamen iuj okcidentaj landoj ankoraŭ ne forlasis siajn ambiciojn kontraŭ la aferoj de la azi-afrikaj popoloj kaj ĉiam longe etendas siajn manojn kaj kruojn por diversmaniere efektiviĝi kulturen enfiltradon por veneni ilin, konforme al la bezonoj de siliaj agresaj agadoj en politiko, ekonomio kaj milito. En la Forumo multaj verkistoj tion ĉi tuŝis en siaj paroloj. “La usona imperiismo kaj la japana monopola kapitalo, mobilizinte gigantan maŝinon de propagando kaj per granda monsumo, faris organizitan frenezan trudon de reakcia ideologio al la japana popolo”, “Imperiismo kaj koloniismo feroce agresas Kamerunon, tiel ke ĝia brila kaj riĉa kulturo suferas sovaĝan detruon”, “La

Liu Bajju (dekstre), ĉefo de la Delegacio de la Unio de Ĉinaj Verkistoj kaj Bakri Siregar (maldekstre), ĉefo de la Delegacio de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj al Azio, subskribas la Kunan Deklaron respektive en la nomo de ambaŭ flankoj.





Prezidanto Maŭ Zedong, Prezidanto Liu Ŝaŭki kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj akceptas la verkistojn partoprenantajn en la Forumo pri Azi-Afrika Literaturo.

senbrida disvastiĝo de la venenplenaj usonaj vivmaniero kaj kulturo en Tajlando alportis grandan malutilon al la bonega kulturo kaj socimoralo de Tajlando”. La suprajn indignajn akuzojn faris la verkistoj Seiĝi Ŝimota el Japanio, Hogbe Nlend el Kameruno kaj Kularb Saipradit el Tajlando.

Sed ili diris samtempe ke la jam vekigintaj azi-afrikaj popoloj ne plu toleras tiujn malpuraĵojn, kontraŭe, ili regas tiujn sinjorajn moŝtojn laŭmerite. Vidu: post la fermiĝo de la Tria Festivalo de Azi-Afrikaj Kinofilmoj, la laboristoj, kamparanoj, virinoj, junuloj.... kaj multaj popolamasaj kulturaj organizoj de Indonezio jam levis movadon por bojkoti la filmojn de la usona imperiismo kaj ricevis laŭdojn kaj subtenon de la popolo tra la tuta lando, ĉu ne? Kaj la japana popolo kaj ĝiaj revoluciaj verkistoj kaj artistoj lukta pintkontraŭ-pinte kontraŭ la atako de la reakciaj kulturo kaj ideologio, ĉu ne? Ankaŭ el la verkistoj de Kameruno, pli kaj pli multaj partoprenis tiun batalon kun plumo en unu mano kaj pafilo en la alia, ĉu ne? Antaŭ la revolucia popolo de Azio kaj Afriko ne ekzistas loko por tiuj abomenindaj demoraligaj putraĵoj!

Ĝuste pro tio, la verkistoj kune kun la popolo sin ĵetis en la ardan batalon en la revolucia ŝtormo de Azio kaj Afriko, kaj elforgis aŭ estas elforganta tute novan literaturon, grandan kaj avangardan.

En la kunsido estas ekspoziciataj pli ol cent verkoj de azi-afrikaj aŭtoroj, ĉinigitaj kaj eldonitaj en Ĉinio dum la lastaj du jaroj. (Ili estas nur malgranda parto de la azi-afrikaj literaturaj verkoj ĉinigitaj kaj eldonitaj en la nova Ĉinio.) La verkistoj ilin foliumis kun ekscitiĝo. Tiuj verkoj, spegulantaj la bataladon de la azi-afrika popolo kontraŭ imperiismo, la nova kaj malnova koloni-

ismoj, kaj por la nacia sendependiĝo kaj liberiĝo montras, kiel la ĉina verkisto Liu Bajju diris: “Se nur la verkistoj vivas kaj lukta kune kun la popolo kaj kunligas kun ĝi sian sorton, la popola penso donos nepre al la azi-afrika literaturo novan vivforton kaj kreos literaturon plej novan, plej belan kaj plej bonan, kaj fine forbalaos la literaturaĵojn venenajn, dekadencajn kaj senhontajn. La azi-afrika literaturo nepre fariĝos plej brila literaturo de la mondo.”

Pri tio ĉi, la indonezia verkisto Bandaharo faris tre bonan klarigon dirante: “La revolucia literatura kaj arta laboro de Indonezio estas ĉiam kondukataj sub la politika gvidado de la revolucio, la revoluciaj literaturistoj kaj artistoj havas intiman rilaton kun la tuta popolamaso, kaj ĝuste pro tio, iliaj verkoj trovis bonan akcepton ĉe la popolamaso kaj antaŭenpuŝis ĝian batalon.”

Kvankam diversaj estas la lingvoj parolataj en la Forumo, la azi-afrikaj verkistoj tamen havis sian klaran komunan lingvon, t. e. batali sur la unua fronto kontraŭ la usona imperiismo kaj la nova kaj malnova koloniismo. Tio estas la komuna konkludo, kiun ili atingis el la dolora historia instruo dum multaj jaroj kaj el la reala vivo, kiun ili persone spertis.

La Forumo daŭris nur du tagojn, sed donis al ĉiuj profundan impreson kaj havis bonan rikolton. Ĝuste kiel la Kuna Deklaro subskribita de la Delegacio de la Unio de Ĉinaj Verkistoj kaj la Delegacio de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj al Azio diras: La Forumo pri Azi-Afrika Literaturo estis kunsido plena de frateco kaj batalspirito, kaj ĝi plene spegulis la batalvolon de la verkistoj kaj popoloj de la du grandaj kontinentoj Azio kaj Afriko.

TRANSLOĜIĜO

ĜANG HIANHUA

I

Vespere, ekblovis vento en la vilaĝo.

La vento blovis de la valo kaj rullevis velkintajn branĉojn, falintajn foliojn kaj sablon, kiujn ĝi ŝutis aron post aro sur la tegolitajn tegmentojn kaj kontraŭ la vitrajn fenestrojn de la domoj eligante klakojn. Iuj vilaĝanoj diris, ke tio estas "seka vento" kiu startinte povas blovadi senĉese forpeli ĉiom da nuboj de sur la ĉielo kaj blovsekigi ĉiom da akvo en la riveretoj kaj neniigi la esperojn pri pluvo en la venontaj dekaŭ pli multaj tagoj.

Aldoninte faskon da hejtaĵo en la fornon, Onklino Manĝen elpaŝis el la kuirejo, kiam ekknaris la pordo kaj entrudiĝis en la domon blovo da sablovento, kiu ŝanceligis la flameton de la petrola lampo en ŝia mano. Laŭ la konataj paŝbruoĵoj ŝi sciis, ke revenas ŝia edzo de la oficejo de la popolkomunumo.

"Kia diabla vetero! Jam tri monatoj ne vidis sufiĉan pluvon." Envenis Onklo Deguj, partisekretario de la Vilaĝo Subrubrarba*, batforigante la polvon de sur sia korpo.

"Vi hejmen revenas nur post kokokrio kaj nur por manĝi kaj trinki!" Onklino Manĝen komencis plendi, sed ekpensinte ke ŝia edzo ankoraŭ ne vespermanĝis, ŝi ne povis lin riproĉi plue. Sin turninte ŝi iris en la kuirejon, levis la kovrilon de la kaldrono, prenis la preparitajn manĝaĵojn el la kaldrono kaj ifin metis sur la tablon. Tre baldaŭ la tablo pleniĝis je bovloj kaj teleroj. Enpaŝinte en la kuirejon, Onklo Deguj diris ridante:

"Tiom da manĝaĵoj! Vi traktas min kiel gaston!"

"Ĉu ankoraŭ estas hejmo en via koro? Por vi ĉi tie estas nenio alia ol gastejo," dirante ankaŭ ŝi ekridis.

"Mi estas tre okupata! Hodiaŭ mi iris al la Vilaĝo Intermonta kun la partisekretario de la popolkomunumo." Onklo Deguj eklevis la bovlon kaj prenis plenbuŝon post plenbuŝo da rizaĵo. Nun li sentis, ke li vere malsatas.

"Morgaŭ, vi nepre petu forpermeson eĉ se vi estos okupata. Vi ja devas prizorgi la hejmon!" La virino serioze deklaris sian decidon.

"Hejmo, hejmo, hejmo, nur pri la hejmo vi zorgas! Serioza sekegeco atakas la Brigadon Intermontan, kie ankoraŭ mankas akvo al ĉirkaŭ cent muoj da agroj, sed restas nur unu sun-periodo **ĝis la tempo de transplantado. Kaj pri tio vi neniom maltrankviliĝas!" Onklo Deguj fikse rigardis al sia edzino, esperante trovi de ŝia mieno iom da kontentiga reago, sed li senesperigis.

"Se eĉ falus la ĉielo, ĝin subtenus altkreskulo. Pri kio mi bezonas maltrankviliĝi!" Post tio Onklino

Manĝen ordonis al sia edzo: "Iru morgaŭ al la proviza kaj disvenda kooperativo por mendi ducent ĝinojn da kalko. Revenvoje vizitu Alin ĉe la Pontkapo kaj interkonsentu kun li pri la laboro. La nova domo estas konstruita dank' al lia helpo. 'Ĝisborde remu, finhelpi penu!' Li nepre nin helpu per ankoraŭ kelkaj labortagoj."

"Kion vi volas?" demandis Onklo Deguj.

"Nu, konstrui porkostalon. Ĉu vi ne vidis, ke la porkino baldaŭ naskos idojn?" demandis Onklino Manĝen.

"Ne urĝu pri tia afero!" admonis la edzo ridante.

"Ho, kiel facilanime vi parolas! Profitante la okazon ke nun ni havas monon, ni konstruu porkejon sufiĉe grandan por ke ĝi estu ĉiam pura kaj oportuna por prepari sterkon."

"Ĉu ne estus pli bone, ke vi starigu bestbredejon!"

Onklo Deguj demetis la bovlon kaj la paron da manĝebastonetoj, kaj ekviŝinte al si la buŝon laŭte ridegis.

Onklino Manĝen koleriĝis pro la malkaŝa moko de sia edzo. "Eĉ birdoj bekportas herbojn por sia hejmo. Se ĉiuj ni sekvus vian ekzemplon, la tuta familio devus pleniĝi la stomakojn per la nordokcidenta vento!" Ŝi ekjetis la manojn ambaŭ flanken kaj indigne iris dispecigi porkofuraĝon apud la forno.

Onklo Deguj palpe elprenis sian pipon, plenis la forneton per tabako kaj ĵetinte ekrigardon al la edzino diris ridante:

"Mi diru al vi la veron. Ni transloĝiĝos."

La virino ne atentis pri lia parolo.

"Ne pensu, ke mi ŝercas," serioze diris Onklo Deguj.

"La popol-komunumo decidis subteni la Brigadon Intermontan kaj transpostenigos min en la montaron."

"Ah?" kun okuloj rondiĝintaj de surprizo Onklino Manĝen haste iris al la tablo kaj manklakante riproĉis sian edzon: "Jen vi, jam viro pli-ol-kvindek-jara, faris tian stultajon! Kia estis tiu loko antaŭe! Eĉ herboj ne kreskis tie! La montanoj forte deziras transloĝiĝi en la vastan mondon! Nur vi, anstataŭ pasigi komfortajn tagojn, kontraŭe volas translokiĝi en la malriĉan valon!"

Fumante ankoraŭ senĝene Onklo Deguj diris kun ekrido:

*Rubrarbo (*Myrica rubra*), subtropika arbo, kies frukto estas bongustaj kaj similaj al fragoj.

**sun-periodo: La jaro estas dividita en 24 sun-periodojn ĉiu el kiu konsistas el ĉ. 15 tagoj.

“Pri tio ke la Vilaĝo Intermonta estis tiel malriĉa antaŭe ke eĉ herboj ne kreskis tie, kulpis la malnova socio. Tion kaŭzis la subpremado de Kuomintango kaj la bienuloj. Depost la Liberiĝo ilia produktado multe pliiĝis. La malfacilaĵojn dum la lastaj du jaroj kaŭzis la naturaj katastrofoj. Bone pensu, kiel pene ili subtenis la revolucion kiam mi gerile batalis en la montoj. Ĉu mi povas esti indiferenta hodiaŭ, kiam ili troviĝas en malfacilo?”

“Sen vi oni povas same vivadi!” La edzino ruĝiĝis de kolero.

“Ne parolu tiel senideale!” la edzo ŝin interrompis. “Ni havas la Partion kaj la popolamason! Se la ĉielo eĉ falus, ni kuraĝus ĝin subteni per niaj ŝultroj!”

“Se vi havas kapablon, vi iru sola! Mi ne vin malhelpos.” Kun rigida mieno la edzino eksidis sur benkon, turnante la dorson kontraŭ la edzon.

“Ne indas, ke vi tiel koleru! Se vi ne iros, iros Himej,” diris la edzo intence.



“Ho oj, kion vi intencas!” La edzino salte levigis de sur la benko kaj rigardante al Onklo Deguj en la vizaĝon kolere diris: “Klare mi diru al vi: La filino ne estas infano trijara. Ŝi decidu ĉion per si mem. Se vi ne zorgas pri vi mem, vi devas zorgi pri la filino. Se vi prenos ŝin en la montaron, ĉu vi ne mizerigos ŝin dum ŝia tuta vivo?”

“Post kiam Himej revenos de la lernejo, mi faros klarigon al ŝi. Estas neeble, ke ŝi ne konsentos!” diris Onklo Deguj kun plena memfido. “Ne maltrankviliĝu pri tia afero!”

“Se ŝi volos iri, mi ne malhelpos ŝin.”

“Do vi ankoraŭ ne iros?”

“Ne, certe ne!” La virino decideme rifuzis lian peton kaj elirante diris kun ruĝiĝintaj palpebroj: “Mi spertis sufiĉan mizeron dum pli ol mia duona vivo kunvivante kun vi. Ĉiel mi volas pasigi komfortajn tagojn en tiuj ĉi novaj ĉambroj kun tegoltegmento.”

Onklo Mangen edziniĝis al Deguj kiam ŝi estis deksejara. Tiutempe ili havis super si la ĉielon de riĉuloj kaj staris sur la tero de riĉuloj. Ili sin vivtenis per brano kaj manĝeblaj herboj, kovris sian liton per pajlo kaj sin vestis per pajlaj pluvmanteloj. La juna virino ne eldiris eĉ unu plendan vorton. Ŝi metis sian tutan esperon sur sia pena laboro kaj sur sia edzo, kiu aliĝis al la gerila trupo en la montoj la sekvintan jaron post la geedziĝo. Ŝi tutkore atendadis la alvenon de la tempo, kiam ŝi havos tian “hejmon”, kaj ne maltrankviliĝos pro vestoj kaj manĝaĵoj.

En doloro kaj espero Onklo Mangen forpasigis pli ol duonon de sia vivo.

Nuntempe, tia kontentiga “hejmo” finfine kreigis: nove konstruita domo, kalke blankigitaj muroj, klare travideblaj vitraj fenestroj, ruĝe lakita lito kun gravuritaj desegnoj, ligna kestego plenplenigita per orkolora greno, kaj la plaĉa novjara bildo sur la muro kun du dikaj beboj brakumantaj grandan kukurbon. Ĉio ĉi montris ŝian zorgeman mastrumadon kaj manifestis la abundan gajan vivon de popolkomunumanoj. Ŝi eĉ ne kuraĝis konjekti, kia fariĝus la vivo, se ili transloĝiĝus en la valon. Tiel ŝi malĝojiĝis, ke ŝi preskaŭ ekploris.

Post la noktomezo, sidante ĉe la litrando Onklo Deguj fumadis senparole kun ĵaketo portata sur la ŝultroj. De multaj jaroj, li kutimis sidadi apud lampumo en profunda nokto por mediti pri diversaj problemoj en laboro. Li sin klinis kaj alparolis la edzinon kuŝantan apud li:

“Mi scias, ke vi ne volas forlasi la belan vivon malsupre de la montoj. En tio mi sola estas riproĉinda, ke dum la lastaj jaroj mi zorgis nur pri la laboroj de la brigado, neniam pensante pri la problemoj en la hejmo. Mi ne helpis vin progresadi. Por diri la veron, la Brigado Intermonta efektive havas malfacilojn. Tamen kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo, ilia nuna vivo estas neniom mizera. Ni ne rigardu nur la nuntempon. ‘Mizera sen riĉaĵo, sed kun idealo’, plej grave estas havi idealon. Fakte la Brigado Intermonta ne estas malriĉa. Ĉie troviĝas trezoroj. Se oni laboras bone, ĝi certe kuratingos la riĉajn brigadojn en tri ĝis kvin jaroj!”

“Ĉesigu vian litanion, kiun mi jam aŭskultis ĝis tediĝo!” La edzino ektiris la litkovrilon, kaj kovris per ĝi sian kapon.

“Ne estas, ke vi aŭskultis ĝis tediĝo, male vi tute ne aŭskultis!” Onklo Deguj tiel kolere ke li eksaltis. Li penis subpremi sian sentimenton kaj forte batforigante la cindron el la pipforneto ĉe litpiedo li diris: “Vi ŝanĝiĝis! Domo kun tegola tegmento, plena grentenejo, aro da porkidoj, ili forkonsumis vian idealon!”

“Unue mi ne spekulacias nek ŝakras, due mi ne dungas laborulojn nek uzuras. Mi agas juste kaj honeste. Kio do montras ke mi estas senideala?” demandis la edzino riproĉe.

“Bone pensu, ke antaŭ dudek jaroj kiam mi gerilis sur la montoj, vi penis elŝpari 4 uncojn da rizo por doni al la batalantaj kamaradoj. Por la revolucio vi estis neniom egoisma. Sed nun ĉu vi ankoraŭ zorgas pri aliaj? Fariĝinte bonhava vi jam forgesis la pasintecon!” Onklo Deguj tiel ekscitiĝis, ke lia voĉo iom tremis.

Lia edzino sin turnis, dirante nenion.

Onklo Deguj ekrigardis la vekhorloĝon sur la tablo kaj vidis, ke estas jam dudek minutoj post la tria en la profunda nokto. Li intencis iri en la montaron antaŭ la tagiĝo. Tial kun la petrola lampo en la mano li paŝis al la ruĝe lakita ligna ŝranko kaj komencis ordigi sian ŝultrosakon por iri en la montaron.

Ne plu povante aŭdi la brueton de sia edzo, Onklino Manĝen flanken puŝis la litkovrilon, sin turninte sidigis kaj maltrankvile demandis:

“Kion vi faras?”

“Hodiaŭ la Brigado Intermonta komencos konstrui kanalon. Mi devas iri en la montaron pli frue.” La voĉo de Onklo Deguj estis milda. Li paŝis al la litrando, kaj diris al la edzino: “Eĉ torento havas reĵetitajn ondojn. Bone konsideru pri la transloĝiĝo?”

“Delonge mi jam ĝin konsideris!” kolere la edzino rekuŝiĝis en la liton.

disvenda kooperativo pro aĉeti kalkon. La urbeto estis nur kvin liojn for de ilia vilaĝo. Kiam ili alvenis al la destinita loko, ĵus leviĝis la ruĝa suno. Ŝvebis en la hela ĉielo fumostrioj leviĝantaj el la kamentuboj de ĉiuj domoj.

La komizo de la vendejo de produktaj rimedoj de la proviza kaj disvenda kooperativo afable akceptis la virinon el la Vilaĝo Subrubrarba:

“Onklino, ĉu vi konstruos novan domon?”

“La nova domo estas delonge konstruita.” Kiam oni menciis la novan domon, denove gajiĝis Onklino Manĝen. “Nun ni konstruos porkstalon. Ho, denove naskiĝos aro da porkidoj.”

La rigardo de la vendisto haltis sur ŝi por momento. Poste li iom foliumis la kontlibron kaj diris:

“Ankoraŭ restas ĝuste ducent ĝinoj. Kalko estas rapide vendata varo. Miloj da ĝinoj forvendiĝis en palpebrumo.”

Onklino Manĝen rapide pagis kaj sendis la du nevojn por elpreni la varon. Kiam ŝi estis elironta por aĉeti iom da vino kaj viando ĉe la vendejo de neĉefaj manĝaĵoj en la najbara domo, iu junulo haste envenis en la vendejon de produktaj rimedoj kaj rekte demandis al la vendisto:

“Ĉu estas kalko, kamarado?”

“Vi venas unu paŝon tro malfrue. La postrestantajn ducent ĝinojn ĵus aĉetis tiu onklino.”

“Kiam denove vi havos stokon?”

“Pri tio mi ne estas certa. Ĉar nun ĉie oni konstruas kanalojn por kontraŭbatali sekegecon, kalko estas vaste bezonata.”

Onklino Manĝen ekhaltis kaj turninte la kapon ĵetis rigardon al la junulo. Ŝi vidis, ke lia kapo ŝvitegas kaj li sin ventumas per la basko de sia vesto. Verŝajne li alrapidis de malproksime. Senkonscie ŝi ekĝemspiris: Feliĉe mi venis pli frue kaj faris unu ŝakpecmovon antaŭe, alie certe estiĝos embaraso.

Ilia interparolo ankoraŭ daŭris:

“De kiu brigado vi estas, kamarado?”

“La Intermonta.”

“Vi ĵus aĉetis mil ĝinojn, ĉu ne?”

“Oni ŝanĝis la planon pri la konstruo de la kanalo, sekve ankoraŭ mankas al ni ducent ĝinoj. Ĉiel klopu por ni, kamarado!”

“Atendu momenton. Tiu onklino aĉetis kalkon por konstrui porkostalon. Mi interkonsiliĝu kun ŝi. Eble ŝi cedos ĝin al vi.”

Kiam Onklino Manĝen aŭdis tion, ŝia koro ekbategis. Ŝi pentis, ke ŝi restis tie. Nun estis tro malfrue por ŝi foriri. Ridetante la vendisto kuratingis ŝin kaj baris al ŝi la vojon:

“Onklino, la Brigado Intermonta suferas seriozan sekegecon. Ĉu vi povas cedi al ili la kalkon, kiun vi ĵus aĉetis?”

“Neeble. Kiel ili, ankaŭ mi urĝe bezonas ĝin. Kiu havas superfluan monon por aĉeti kion li ne bezonas?” kategorie rifuzis Onklino Manĝen.

“En ĉio oni devas konsideri, ĉu tio estas grava kaj urĝa aŭ ne,” diris la vendisto ridante. “Ĉiuj estas nun subtenantaj la Brigadon Intermontan. Via privata afero.....”



II

Frumatene de la tria tago post tio, Onklino Manĝen kune kun du malproksimaj nevoj iris al la proviza kaj

“Kio do pri mia privata afero?” Onklino Manĝen interrompis lin akra voĉe kaj abrupte forlasis la vendejon.

Pro tio ke ŝi foriris tro haste, la ĉiam zorgema virino neatendite eĉ forgesis aĉeti vinon kaj viandon. Kiam tion ŝi rimarkis, ŝi jam alvenis al la Vilaĝo Subrubarba. Ŝi ekĝemis kaj anstataŭ reveni hejmen rekte iris al la Pontkapo por viziti Alin.

En la malnova socio Alin laboris kiel jarlaborulo, lernis metion kaj estis en sia elemento en ĉiaj laboroj kiaj plugado, transplantado de rizplantidoj, kampokonstruado sur monto-deklivo aŭ konstruado de domoj. Li estis bone konata en la ĉirkaŭaĵo de dekoj da lioj. Honesta kaj senartifika, li estis preta helpi ĉiun ajn kiu estis en malfacileco. Transsciigite pere de iu ajn, li tuj forlasis sian propran laboron kaj iris al la petinto kun siaj hakilo kaj segilo, nezorgante ĉu la vojo estas longa aŭ ne, aŭ ĉu la vetero estas pluva aŭ ventega. Ĝuste pro tio, Onklino Manĝen pensis, ke ŝi devas peti lin konstrui la porkstalon kaj nur lia laboro estas fidinda kaj kontentiga.



Enpaŝinte en la domon de Alin, ŝi renkontis lin eliron-ta kun siaj ŝtonborilo, granda martelo kaj litajpako. Senprokraste ŝi haltigis lin:

“Ha, vere multe okupata vi estas. Kien vi iras?”

“En la montaron,” rikanis Alin naive. Vidinte ke ŝi baras al li la vojon per ambaŭ manoj, li sciis ke ŝi havas ian helpopeton al li. Li do demetis siajn ilojn kaj litajpakon.

“Bofratino*, rapide envenu kaj sidiĝu!” ridante komplimentis la kapabla kaj lerta edzino de Alin, kiu elvenis el la interna ĉambro kun infano ĉirkaŭ-unu-jara portata en ŝiaj brakoj.

“Dankon, mi ne sidos,” kore ridis ankaŭ Onklino Manĝen, “mi venas por peti helpon de Alin.”

“Diru al ni kion vi volas,” diris la edzino de Alin senĉirkaŭturne.

“Mi timas, ke eble vi ridos pri ni. La porkino baldaŭ naskos idojn, tamen ankoraŭ mankas al ni porkostalo. Pri tia afero mi ne volas zorgi. Sed, ve, kion fari? Sin trovas ĉe ni tri personoj, tamen neniu krom mi zorgas pri io ajn ĉu en la domo aŭ ekster ĝi!”

“Vi volas konstruigi porkostalon, ĉu ne?” La edzino de Alin komprenis ŝian intencon.

“Ja, efektive,” serioze respondis Onklino Manĝen. “Tian aferon mi povas trankvile komisii nur al Onklo Alin.”

“Ĉu Frato** Deguj ne iris en la montaron?” Alin ne rekte eldiris sian opinion.

“Ne menciu lin. Eĉ unu vorton li ne sendis al mi post kiam li iris en la montaron antaŭ tri-kvar tagoj.” Onklino Manĝen tiel kortuŝiĝis, ke ŝiaj palpebroj ruĝiĝis.

“Oni diris, ke vi transloĝiĝos?” sonde demandis Alin.

“Tio ne estas vera!” deklaris Onklino Manĝen gravmiene. “Li iru larĝan ŝoseon sian kaj mi iru ponton sol-traban mian!”

“Kiel tio estas ebla? Frato Deguj tutkore laboras por la amaso.” La honesta kaj senruza Onklo Alin volis ŝin persvadi, sed tiumomente ne povis doni multajn argumentojn. Li tiel maltrankviliĝis, ke li forte tordis la manojn.

Onklino Manĝen timis, ke la parolo deflankiĝos, tial ŝi rapide ŝanĝis la paroltemon:

“Alin, la bezonataj materialoj jam pretas. Nepre helpu nin per kelkaj labortagoj.”

“Ĉu vi ne vidas, ke mi tuj iros en la montaron?” Alin rifuzis ŝin ĉirkaŭfrazo.

“Ĉu oni konstruos domon en la montaro?”

“Ne, la tiea brigado konstruas kanalon.”

“Ha, denove konstrui kanalon,” diris Onklino Manĝen senplezure. “Estas multaj homoj en la montaro. La ĉielo ne falos pro manko de unu persono!”

“Tamen, kun unu plia persono la kanalo povas esti kanstruita iom pli frue,” firme diris Onklo Alin.

“Plej intimas samvilaĝanoj. Vi ne devas kurbigi vian brakon eksteren.” Onklino Manĝen lin riproĉis, ekfrapante al si la femuron. “Ĉu vi ne zorgas pri mia malfacilaĵo?”

“Onklino Manĝen, ne ofendiĝu pro mia malkaŝa parolo! Ankaŭ tiuj en la montaro estas niaj samfamilianoj. La konstruado de la kanalo por kontraŭbatali sekegecon estas unuaranga gravaĵo. Por ne paroli, ke Frato Deguj direktas la laboron en la montaro, se li eĉ ne estus tie, vi same devus cedi al la amaso.” Onklo Alin iom ekscitiĝis.

“Lasu flanke la amason, laŭlaboran pagon vi ja ricevos tutegale,” diris Onklino Manĝen nesamopiniante kun li. “Se vi helpas min per kelkaj labortagoj, mi pagos al vi neniom malpli multe.”

“Ki—kia homo min vi konsideras?!” Kun mieno severiĝinta, Onklo Alin eksaltis kaj fiksrigardis al Onklino Manĝen kun tia kolero, ke li povis nenion eldiri dum longa tempo.

*La ĉinoj kutimas tiel titoli la similaĝajn virinojn edziniĝintajn por montri intimecon.

**Intima titolo por similaĝa viro.

Onklino Manĝen retroiris kelkajn paŝojn kaj ruĝiĝis ŝia vizaĝo. Sentante sin iom malprava, ŝi ne kuraĝis respondi. Vidinte, ke la situacio graviĝis, la edzino de Alin rapide klopodis interpacigi ilin:

“Bofratino, estu pardonema al li, ja tia malkaŝemulo li estas!”

“Respondu al mi! Por kiom da pago vi streĉis vian zonon por subteni la revolucion antaŭe? Ĉu Frato Deguj partoprenis la geriladon por ke li mem ĝuu komfortan vivon?” Onklo Alin demandis al ŝi indigne. “Onklino Manĝen, bone meditu en via koro. Vi forgesis la pasintecon kaj ŝanĝiĝis via koro!”

Pli ruĝiĝis la vizaĝo de Onklino Manĝen. Ŝi povis trovi neniun vorton por lin respondi. Ŝi eksentis acidon en la nazo kaj retenante la larmojn kuris hejmen unu-spire. Sento de soleco kaj izoliteco ekatakis ŝin kaj ŝi sentis sin ĝenata ĉu sidante aŭ starante. Ekmemorante, ke kiam la edzo foriris ankaŭ li diris la samajn vortojn kiel Onklo Alin, ŝi sentis kaj honton kaj bedaŭron. Ŝi sidiĝis en bambuan apogseĝon kaj ekploris mallaŭte.

Tiam envenis unu el la nevoj, kiuj akompanis ŝin aĉeti kalkon. Li paŝis al la tablo kaj silente metis amason da bankbiletoj antaŭ ŝin. Onklino Manĝen forviŝis la larmojn per la basko kaj levinte la kapon rigardis lin embarasite:

“Por kio estas la mono?”

“Tio ĉi estas la mono, per kiu vi intencis aĉeti kalkon,” diris la nevo. “Kiam ni revenis portante la kalkon, ni preterpasis la provizan kaj disvendan kooperativon. Aŭdinte ke la Brigado Intermonta urĝe bezonas kalkon por konstrui kanalon, ni decidis por vi cedi ĝin al ili.”

Onklino Manĝen eligis longan spiron kvazaŭ liberigite de mil-ĝina ŝarĝo kaj sentis sian koron malpeziĝinta.

La nevo diris plue:

“Onklino, Tria Onklo petis iun transsciigi al vi, ke vi iru en la montaron por pririgardi kiam vi havos tempon.”

Onklino Manĝen ektuŝiĝis, kaj ŝi klinis la kapon senvorte.

III

Finfine Onklino Manĝen decidis kun forta sindevigo iri en la montaron.

Ŝi havis kuzinon de patrino flanko, kiu edziniĝis al iu en la montaro antaŭ dudek jaroj. Komuniko inter ili jam ĉesis delonge. Nun ŝi volis iri en la montaron pretekstante viziti parencon.

Laŭ la kutimo en la vilaĝoj por parenco-vizito, ŝi preparis vaporumilon da rizaĵo kaj aĉetis du ĝinojn da bombonoj, per kiuj ŝi plenigis korbon de pilgrimanto. Frumatene, ŝi sidiĝis antaŭ la spegulo de sia filino por aranĝi al si la harojn. Ŝi ŝanĝis siajn vestojn kaj surpronis kompletan da novaj ĵaketo kaj pantalono el nigra kepro. Petinte la najbarojn prizorgi por ŝi la kokojn, anasojn kaj porkojn, ŝi frue ekiris al la montoj brakportante la korbon.

Post ĉirkaŭ du horoj Onklino Manĝen transpasis la unuan monteĝon. Ŝi rigardis foren kaj vidis ke malantaŭ la arbaro kie flirtas malgranda ruĝa flago

malklare videblas blanka muro. Nu, ĝi estas apudvoja pavilono.

Onklino Manĝen plirapidigis siajn paŝojn, sed subite ŝi aŭdis laŭtan krion:

“Haltu!”

Ŝi konsterniĝis. Antaŭ ol ŝi havis tempon por pripensi kio baldaŭ okazos, ŝi estis faletante tirata perforte de iu junulo dudek-kvinses-jara en la pavilonon. Tuj poste aŭdiĝis surdiga eksplodo kaj el la aero falis, kvazaŭ hajleroj, terbuloj kaj ŝtonetoj.

“Kiel danĝere! Ĉu vi ne vidis la flagon apud la vojo? Nia Brigado Intermonta nun eksplodigas monton por konstrui kanalon.” La junulo iom sin trankviligis kaj rigardante al Onklino Manĝen, kiu ankoraŭ portis streĉitan mienon, subite demandis kun ĝojego: “Ha, ĉu vi ne estas la onklino, kiu cedis al ni la kalkon?”

Onklino Manĝen rekonis la junulon kiu staris antaŭ ŝi, ruĝiĝis kaj ne sciis kiel respondi.

Aro da junaj komunumanoj, kiuj estis manĝantaj gluajn rizbulojn, aŭdis ilian interparolon kaj ridante kolektiĝis kaj ripete laŭdis Onklinon Manĝen:

“Onklino, vi donis al ni grandan helpon. La kanalo povos ekkonduki akvon tri tagojn antaŭdate.”

“Finkonstruante la kanalon, ni produktos pli multe da greno por subteni la socialisman konstruadon. Ankaŭ onjo havas meriton.”

Ju pli Onklino Manĝen aŭskultis, des pli ŝi hontis. Ŝi demetis la korbon, sidiĝis sur benko anhelante kaj intence forturnis la paroltemon demandante:

“Kia vojo tiu ĉi estas! Oni diras, ke ĝi longas dudek-kvin liojn, sed ĝi estas nefinirebla. Kiom da lioj ankoraŭ restas efektive?”

“Ne multe, ok longaj lioj aŭ dek mallongaj. Naŭ laŭ la norma mezuro. Iru supren laŭ tiu ĉi vojo kaj kiam vi atingos la lokon ĉielskrapantan, tie vi trovos nian vilaĝon.” Fiksrigardante al la korbo de pilgrimanto de Onklino Manĝen, la junulo demandis kun vizaĝo plena je ridoj: “Ĉu vi venas en la montaron por elekti bofilon aŭ trovi bofilon?”

“Mi venas nek por elekti nek por trovi, sed por viziti parencon.” Infektite de la gaja sento de la junulo, ankaŭ Onklino Manĝen ridis nereteneble.

La junulo elprenis el sia manĝskatolo du bulojn da glueca rizo kun bruna sukero kaj kun granda bovlo da varma supo en la mano, paŝis al Onklino Manĝen ridante:

“Onklino, trinku bovlon da varma supo ke vi iru pli facile.”

Ŝi estis multe soifa. Transpreninte la bovlon kaj ektrinkinte, ŝi tuj kuntiris la brovojn. “Kia supo ĝi estas!” Vidante foliojn de amara sovaĝlegomo naĝantaj en la bovlo, ŝi demandis surprizite: “Ĉu ĝi estas ruĝflora legomo?”

Ridego eksplodis inter la gejunuloj.

“Jes, ĝuste tio,” certigis la junulo. “Novan regulon fiksas nia junula sturmotrupo: Ĉiu devas trinki iom da ĝi.”

Rigardante al la herbofolioj en la bovlo, Onklino Manĝen ekpensis pri la malfacilaj jaroj dum la revolucia milito. Tiel ŝi malĝojiĝis, ke ŝi preskaŭ larmis.

“Ne ĝin subtaksu,” diris iu junulino. “Ĝi estas ‘revolucia’ legomo, kiu povas fortigi al vi revolucion volon.”

“Onklino, nia nova partisekretario diris al ni rakonton,” diris la junulo. “En la pasinteco kiam la gerila trupo estis ĉirkaŭita de la blankaj diabloj en la montaro, ili suferis pro manko de greno dum pli ol unu monato. Sciinte la malfacilon de la kamaradoj, iu onklino spite ĉion sendis sur la montojn sian nuran duonkorbon da rizo, per kiu ŝia tuta familio devis sin vivteni. Tiu-tempe malsatego regis ankaŭ en la vilaĝo. Ŝia trijara filino estis tiel malsata, ke ŝi kaptis manplenon da rizo por ĝin enbuŝigi, sed la patrino tion vidis kaj ĝin forprenis. La knabino ekploris laŭte. Ekploris ankaŭ la patrino, ĉirkaŭprenante sian oste malgrasan infanon. Tenante bovlon da supo kun amara sovaĝlegomo, ŝi diris al la filino: ‘Ne ploru, ne ploru! Trinkinte tiun ĉi bovlon da supo, vi plenkreskinta ne forgesos la pasintecojn kaj persistos ĝisfine en la revolucio dum via tuta vivo!’ La amara vegetaĵo ja estis ruĝflora legomo.”

Onklino Manĝen subite kovris la vizaĝon per la manoj kaj komencis ploregi nereteneble.

“Ĉu vi konas ilin, Onklino?” demandis la junulo.

“Ŝi estas ĝuste Himej.” Guto post guto de larmoj falis el inter la fingroj de Onklino Manĝen.

“Ĉu Himej de la Vilaĝo Subrubrarba?” plue demandis la junulo.

“Ne, eble alia Himej,” rapide parolŝanĝis Onklino Manĝen, ekpremante la lipojn kaj retenante la larmojn.

“Onklino,” diris la junulo ekscitite, “ni nun trinkas supon de amara herbo ja por ke ni ne forgesu la pasintecojn, ne forgesu la revolucian firmvolon de niaj antaŭuloj!”

“Bone, mi trinkos la supon!” Forviŝinte la larmojn, Onklino Manĝen levis la kapon kaj eltrinkis la varman supon.

La ruĝa suno leviĝis pli alten kaj staris jam super la arboj. Kiel freŝa kaj serena la pejzaĝo en la montaro estas!

Nun sereniĝis la koro de Onklino Manĝen, ŝiaj piedoj fariĝis facilmovaj kaj ŝiaj paŝoj ne plu ŝanceliĝis. Ridante ŝi demandis al la junulo, kiu ŝin akompanis al la vilaĝo:

“Ĉu vi vidis Onklon Deguj el la Vilaĝo Subrubrarba?”

“Ĉu vi demandas pri nia nova partisekretario?” La okuloj de la junulo ekbrilis kaj li tiel ekscitiĝis ke ruĝiĝis lia vizaĝo. “Ha, bravulo li estas! En la tago,

kiam li venis en la montaron, eĉ sen trinki iom da akvo, li tuj gvidis grupon da homoj al la Blanknuba Rokego, kie li volis traeksplodi breĉon en la monto por enkonduki akvon. Post la finkonstruo de la kanalo, ni vivos bone se ni rikoltos ĉijare kvindek ĝinojn pli multe da greno el ĉiu muo*. En la venonta jaro ĉiu familio havos superfluan grenon kaj neniu konsumos ekster sia porcio. Tio ĉi estas la unua movo de ŝakpeco de nia partisekretario!”

“Ho, ĉu estas ankoraŭ dua movo?” ridis Onklino Manĝen. Ŝi sentis, ke ŝia koro subite proksimiĝis a tiu de ŝia edzo.

“Jes,” respondis la junulo, ekpuŝante la bambuan ĉapelon sur la kapo iom malantaŭen. Montrante al iu dezerta monto, li diris: “Tie ni kreskigos arbojn venontjare. Kaj kaŝtanoj de Tingĝoŭ, pampelm- arbojn de Hiamen, kaj oranĝarbojn de Ĝangĝoŭ, nia

partisekretario laŭ la opinioj de la komunumanoj skribis al la gubernia registaro por transpreni ĉi tien. En malpli ol tri ĝis kvinjaroj tie fariĝos monto de floroj kaj fruktoj.”

“Ĉie estas trezoraĵoj ĉi tie. Ni tranĉas pinojn por rezino printempe kaj hakas arbojn vintre. En junio kaj julio, post ekfalo de aŭtuna pluvo, ĉie sur la montoj kreskas diversaj fungoj, kiaj ruĝaj fungoj, legom- fungoj, kokaĵ-

fungoj ktp. Supo de fungoj estas tiel bongusta por regali gastojn, ke ĝin trinkinte eĉ feinoj volas veni vivi en la homa mondo.” Tiklate de la plezura parolo la junulo ridegis infanece.

“Ha, vi parolas, kvazaŭ mi estus neniam gustuminta supon de fungoj,” Onklino Manĝen intence lin incitis.

“Tamen la fungoj estas pli bongustaj se ili estas freŝe deŝiritaj,” asertis la junulo senceremonie. “Se vi ree venos en la montaron post du jaroj kiam ni jam kuratingos la riĉajn brigadojn, mi estas certa ke ankaŭ vi ne plu volos malsupreniri.”

“Kio malsupre de la montoj povus kroĉdeteni min per sia ŝatindeco? Nun mi jam decidis ne iri malsupren,” diris Onklino Manĝen ridante.

“Ĉu vi ne kredas?” Pensante ke ŝi ŝercis, la junulo diris kun tia grava mieno kia estis neniom konforma al lia aĝo, “Oni ne timas malriĉecon, sed mankon de



*Muoj = $\frac{1}{15}$ hektaro.

idealo. Onklino, ne opiniu, ke nia idealo estas celi nur bonajn manĝojn kaj bonajn vestojn. Vi eraras se vi tiel pensas. Anstataŭe, ni volas trarabati vastan socialisman ŝoseon tra la valo!"

La montvojo sub iliaj piedoj iom post iom larĝiĝis kaj ebeniĝis. Tuj post ĉirkaŭiro de montpinto aperis antaŭ ili montvilaĝo: En la valo ĉirkaŭata de montpintoj, malantaŭ la densdensaj arbaroj staras en unu vico pli ol dek grandaj terdomoj, antaŭ kiu fluas murmurante inter sovaĝaj floroj klara akvo de rivereto.

"Jen ĝi." La junulo ekhaltis kaj forminte funelon per ambaŭ manoj kriis al la vilaĝo en tirata voĉo: "He, venis gasto!"

Neniu en la vilaĝo respondis. La junulo multe maltrankviliĝis pensante ke la gasto estas malĝentile traktata. Kun bedaŭro li klarigis:

"Ne ofendiĝu, ne ofendiĝu! Ĉiuj estas for por konstrui la kanalon. Restas nur kelkaj maljunulinoj prizorgantaj infanojn en la infanvartejo. Onklino, la unua domo, kiun vi renkontos enirinte en la vilaĝon, estas la infanvartejo. Vi povas peti informon tie."

Onklino Manĝen eniris en la vilaĝon sola. En la infanvartejo efektive sidis sur ŝtona ŝtupo iu maljunulino, kiu sin sunumis kun grupo da infanoj. Per duonfermi-

taj okuloj ŝi rigardis Onklinon Manĝen dum momento kaj post kiam ŝi certigis ke venis gasto ŝi tuj disponigis al ŝi apogseĝon kaj kompleze petis ŝin sidigi. "Bofratino, ĉu vi venas viziti parencon?" ŝi demandis.

"Mian proksiman kuzinon, kun kiu mi ne havis kontakton dum dudek jaroj."

"En kies familio ŝi estas?"

"Ŝia edzo estas nomata Li Kinglin. Ŝi edziniĝis en la montojn en la jaro kiam la aeroplanoj de la japanaj diabloj bombis Tingĝou."

"Do, vi venas viziti nian vicbrigadestrinon. Ŝi sendis trinkaĵon al la Blanknuba Rokego."

Onklino Manĝen estis parolonta kiam de ekstere entrudiĝis pli-ol-kvindek-jara virino kun sunbrunigita vizaĝo. Ŝi estis ĝuste ŝia kuzino Onklino Lanhiang.

"Ĉu venis Fratino Manĝen?" Onklino Lanhiang la unua rekonis la gaston, rapide kaptis la manon de Onklino Manĝen kaj diris laŭte ridante: "Ni ne intervidiĝis dum ĉirkaŭ dudek jaroj. Mi apenaŭ kuraĝis vin rekonii. Hieraŭ via Himej venis ĉi tien kaj diris, ke ŝi skribos leteron por vin venigi. Ĉu vi jam decidis transloĝiĝi?"

"Jes, mi jam tion decidis," respondis Onklino Manĝen rekte.

"Mi vivos en la montvalo dum mia tuta vivo."

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



DISVOLVIĜO EN FORSTIGADO

En la malnova Ĉinio, arbaroj estis senĉese dehakitaj kaj detruitaj, kaj sekve ofte okazis, sur la vasta tero, natura katastrofo de sablo-ventego, sekegeco, inundo kaj erozio.

Post la Liberiĝo, la popola registaro vaste mobilizis la popolamasojn por streĉa forstigado kaj akiris grandajn sukcesojn. Dum la pasintaj dekkvin jaroj, Ĉinio forstigis ĉiujare pli ol 10,000,000 muojn. En 1963, la tuta lando forstigis areon egalan al la kvinoblo de tiu de 1911 ĝis 1946 en la malnova Ĉinio. Krome, estas nun en la tuta lando pli ol 3000 ŝtataj forstoj, kiuj ekformiĝis novaj bazoj de ligno.



SPORTOJ POPULARIĜIS

En la nova Ĉinio, sportoj jam fariĝis populara aktivado ĉe la vastaj amasoj.

Laŭ statistiko, en Ŝanhajo sola jam troviĝas 60,000 sportaj teamoj de pli ol 30 sportospecoj. En 1964, estis registritaj tie 3,200,000 personfojoj de naĝantoj kiuj vizitis la naĝejojn. Somere estis pli ol 10,000 homoj kiuj transnaĝis Huangpu-riveron pli ol mil metrojn larĝan. En la naĝado partoprenis ankaŭ 9-jara infano kaj 65-jara aĝulo. Tablotenis kaj korbopilko estas aliaj du sportoj ŝatataj de la ŝanhajaj loĝantoj. La internacie konataj

tablotenisistoj Li Fuĵong, Hju Jinŝeng, Ĝang Hielin ĉiuj estas el tiu ĉi urbo.

El la tuta loĝantaro de 800,000 personoj en Dongvan-gubernio, Guangdong-provinco, preskaŭ duono ellernis naĝadon. La naĝistoj de tiu gubernio distingiĝis per siaj sukcesoj atingitaj dum la lastaj jaroj. 6 homoj el ili rompis la ŝtatan rekordon de naĝado dek tri fojojn en tri objektoj kaj unu homo atingis la ŝtatan rekordon.

Aperos Nova Vjetnama Poemkolekto:

TAGKAJERO EN PRIZONO

DE

HO CHI MINH

Tradukis el la vjetnama

DAO ANH KHA

Granda verko de granda homo. Bele presita sur bona papero. Eldonkvanto limigita. Antaŭmendu ĉe: SUNHASABA, 32 Hai Ba Trung, Hanojo (D. R. de Vjetnamio).



III. PRAKTIKA VEJĈI-LUDO (Daŭrigo)

2. Komenco de la Ludo

1) **Du postuloj** — Antaŭ tute libera vejĉi-tabulo la ludantoj certe povas meti sian ŝtonon ĉien ajn sur la kruciĝoj. Tamen por gajni la ludon t.e. akiri pli grandan teritorion, en la komencaj ŝtonmetoj oni devas kontentigi la jenajn du postulojn:


a) *Bazoj nevenkeblaj* — Tio signifas, ke la unuaj ŝtonoj devas okupi sekurajn lokojn facile defendeblajn kontraŭ malamikaj atakoj. El la antaŭa ĉapitro ni scias, ke por kontentigi tiun ĉi postulon, punktoj ĉe la angulo estas la plej taŭgaj.

b) *Bazoj facile disolveblaj* — La ludo ja ne celas sekurigi nur la unuajn ŝtonojn, sed ĉefe akiri pli grandan teritorion. Por tio la unuaj ŝtonoj devas ne nur sin sekurigi ĉe iu angulo kiu estas facile enfermebla kvankam ne facile endanĝerigebla de la kontraŭa flanko, sed ankaŭ alporti per tio tre favoran situacion por la tuta ludo.

En la komenco la vejĉi-ludantoj devas bone solvi tiun ĉi dilemon.

2) **Kutimaj komenc-ludoj** — Laŭ multjara sperto de la vejĉiistoj, estas kvar punktoj kiuj povas kontentigi la du kontraŭdirajn postulojn. (v. Diag. 45)

Diag. 45



a) 3-4 punkto (t. e. la kruciĝo de la 3-a kaj 4-a linioj de du najbaraj flankoj, ekz-e ② aŭ A en la Diag. 45)

b) 3-5 punkto (ekz-e ⑧ aŭ B en la Diag. 45)

c) 4-5 punkto (ekz-e ③ aŭ C en la Diag. 45)


ĉ) 4-4 punkto (ekz-e ④ en la Diag. 45)

Krome kelkfoje oni ankaŭ komencas ĉe la 3-3 punkto. Sed ĝi kontentigas nur la unuan postulon. Tial ĝi ne estas preferinda.

3) **Dismeto kaj interligo** — La unuaj ŝtonoj devas esti metitaj dise je ĉiuj taŭgaj punktoj tra la vejĉi-tabulo, ke ili ĉiuj kreu bazojn por estonta disvolviĝo, sed ne amasiĝu en unu sama parto de la tabulo. Ĉar tio ĉi signifas fordonon de la ceteraj partoj al la kontraŭa flanko.

Tamen samtempe oni devas zorgi la interligitecon de la metitaj ŝtonoj, ke ili povu interhelpi en estonta batalo kontraŭ atakoj.

Diag. 46



La Diag. 46 tre bone ilustras la aplikadon de tiuj du principoj. En tiu ĉi diagramo la nigra kaj la blanka flankoj uzis po 10 ŝtonojn. Sed la nigra flanko okupis per dense vicigitaj ŝtonoj nur ĉirkaŭ 40 punktojn, dume la blanka flanko dismetis interligite siajn ŝtonojn kaj per tio okupis preskaŭ ĉiujn ceterajn angulojn kaj flankojn sur la tabulo. Tial la supereco de la blanka estas jam certigita.

Vortoj signitaj per "*" estas klarigitaj en "Nia Vortareto"

Nofhan: Letero al Malproksimaj Amikoj (VI)

FAMILIO KAJ PARENARO DE ĈINOJ

Karaj geamikoj,

En tiu ĉi letero mi iom parolos laŭ via deziro pri la familio kaj parenar-o de ĉinoj.

Estas tute nature, ke oni havas ofte tre intiman senton al la familio en kiu li naskiĝis kaj kreskis. Same ankaŭ la ĉinoj, kaj la long-daŭra feŭda socio* plifort-ig-as tiun ĉi senton.

Tamen en la malnova socio, ne estis facile por la vasta laboranta popolo t. e. la ekspluat-at-aj* laboristoj kaj kamp-ar-anoj ĝui tian senton. Ili estis ofte dev-ig-at-aj for-lasi la hejmon kaj adiaŭi la parenaron por fuĝi de la ne-tolereblaj ekspluat-ad-oj kaj persekutoj, aŭ serĉi viv-rimedon ali-loke. Multaj eĉ mortis sen-hejme kaj sen-parence.

Nur post la Liberiĝo (1949), la laboranta popolo ekĝuis veran familian intimecon de la parenaro, kaj ne plu timas ĝin perdi kiel antaŭe pro sub-premo de la ekspluat-antoj. Tial ankaŭ tie ĉi troviĝas la forto de la ĉina popolo por la socialisma konstruado kaj batalo kontraŭ imperiismo.

La familio ordinare estas formita de tri generacioj. La maljunaj geavoj ofte kun-vivas kun siaj ge-filoj, bo-filinoj kaj ge-nepoj. Prizorgi la vivon de la maljunaj ge-patroj estas la devo de la ge-filoj, kaj prizorgi la etulojn de la familio estas ĝuo de la maljunuloj. Post edziniĝo la filinoj ek-vivas kun la edzo kaj sin lig-iĝ-as al lia familio.

La titolado de la parencoj parte malsamas ol tiu de la okcidentanoj. Sube estas la ĉefaj diferencoj.

1) La aĝaj kaj malpli aĝaj parencoj estas malsame titolitaj — Ekz-e oni titolas la aĝan fraton unu-maniere


kaj la malpli aĝan ali-maniere. Same ankaŭ la pli aŭ malpli aĝajn fratinojn, onklojn kaj onklinojn.

2) Malsame titolitaj estas ankaŭ parencoj patro-flankaj kaj patrino-flankaj — Ekz-e onkloj, kuzoj eĉ avoj kaj nepoj ktp. patroflankaj kaj patrinoflankaj.

Tamen la plej kutima kaj intima titolo nun de la ĉinoj estas "kamarado". Ĝi esprimas ilian samcelecon en la socialisma konstruado por atingi komunismon*.

Rakontoj pri Afanti

LUPO KIU NE MANGĜAS ŜAFON



Iu maljuna paŝtisto foje demandis al Afanti:

"Afanti, dum multaj jaroj mi paŝtis ŝafojn, sed multaj el ili estis mortigitaj kaj formanĝitaj de lupoj. Ĉu en la mondo troviĝus lupo, kiu ne mangĝas ŝafojn?"

"Kompreneble jes!" respondis Afanti.

"Kia lupo?"

"Mortinta!"

KION MEMORI KAJ KION FORGESI?

Iu aŭdis ke Afanti estas saĝa kaj mult-scia. Tial li lin vizitis de-malproksime por peti konsilon. Kiam li vidis Afanti, li demandis:

"Diru al mi, estimata Afanti, kion oni devas ĉiam memori, kaj kion oni devas forgesi eterne!"

Pri-pensinte momenton Afanti respondis:

"Se oni faris ion bonan por vi, tion vi devas memori ĉiam; se vi faris ion bonan por aliaj, vi devas tion forgesi eterne."

Nia Vortareto

Feŭda socio — La socio antaŭ la kapitalisma socio.

Ekspluati — Ĝui frukton de alies laboroj sen-page aŭ pagante ne egal-valore.

Fuĝi — Forkuri por sin savi de danĝero

Komunismo — La plej alta kaj la plej ideala socia sistemo post la kapitalisma socio. En ĝi ne plu estas ekspluatado kaj klasoj inter la homoj.

Aŭskultu Radion Pekino

De la 19-a de decembro, 1964, Radio Pekino jam alprenis Esperanton kiel unu el siaj lingvoj por internacia disaŭdigo. La voĉo de Esperanto el Pekino, longe atendata de miloj da esperantistoj tra la mondo, jam disaŭdiĝas tra la internacia aero. Ĉu vi volas aŭdi la ritmon de socialisma konstruado sur la vasta tero de Ĉinio? Ĉu vi volas aŭdi la inspiran muzikon kaj vivple-najn kantojn de la sescent kvindek milionoj da revoluciantaj, konstruantaj kaj feliĉe vivantaj popolanoj? Nu, ŝaltu vian radioricevilon je la ondoj 51m. (5880 kcs), 40.4m. (7440 kcs), aŭ 30.1m. (9955 kcs), je la horo 20.00 vendrede kaj sabate laŭ la horsiste mo de Greenwich, kaj aŭskultu ĝis la horo 20.30.

Nu, la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino estas infano naskita antaŭ nur kelkaj monatoj. Ĝi certe havas sian malfortecon kaj mankojn. Vartu ĝin kaj helpu ĝin per viaj valoraj opinioj kaj konsiloj, ke ĝi pli kaj pli kontentigu la internacian bezonon de Esperanta disaŭdigo pri la nova Ĉinio.

KONCIZA GEOGRAFIO DE ĈINIO —Verkita de Ĵen Judi. Esperanta eldono de la Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. Formato 13 x 18, 5cm. 240 pĝ. plus 12 pĝ. da fotoj kaj 5 mapoj: Simpla Mapo de Ĉinio, Profilo de Ĉinio je Latitudoj 35°N, La Zonoj de Temperaturo, La Maroj kaj Marbordoj de Ĉinio, La Trunkaj Linioj de Ĉinaj Fervojoj.

Kvankam Ĉinio estas lando kun tre vasta teritorio kaj grandnombra loĝantaro, tamen eĉ ĝia preciza situo estas ne sciata de iuj eksterlandaj legantoj. Multaj el niaj eksterlandaj amikoj ofte postulis, ke iu geografia libro pri Ĉinio estu eldonita por bona kompreno pri Ĉinio. La recenzata verko vere respondas al la urĝaj bezonoj de niaj esperantistaj amikoj, al kiuj mankas necesaj fundamentaj scioj rilate al la geografio de Ĉinio.

La libro estas dividita en du partojn. La unua parto faras ĝeneralan superrigardon pri la lando, popolo, topografio, klimato, naturdotoj, akvoj, agrikulturo, industrio kaj komunikado. En la dua parto estas aparte pritraktataj la 22 provincoj, 5 aŭtonomaj regionoj kaj 2 urbejoj, dividitaj en sep regionojn en pli mal-

pli detala prezentado pri iliaj cirkonstancoj kaj karakterizaĵoj.

Pro la rapidaj ŝanĝiĝoj de la lando dum la lastaj 15 jaroj la libro donas abundajn sciindaĵojn ankaŭ al tiuj, kiuj iam antaŭ tiu periodo loĝis aŭ vojaĝis en Ĉinio, sed ne revidis ĝin en la lastaj jaroj.

La lingvo de la libro estas facile komprenebla.

En la apendico troviĝas kompara tabelo de interrespondaj literoj de Esperanto, Hanlingva Alfabeto kaj Internacia Fonetika Alfabeto, kiu faciligas eltrovon de ĝusta prononco de la esperantigitaj nomoj kaj kritikon pri la uzata transskriba sistemo. En la 8-a linio de malsupre sub la kolono H.F.A. en la paĝo 236, devas stari ankaŭ la litero "r" post "sh".

I.O.

LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERiestro kaj du aliaj Fabejoj de H. C. Andersen, tradukita de Ib. Schleicher, eldonita de KOKO.

La libro estas bele presita kaj havas en si multajn kolorigitajn ilustraĵojn. La tradukinto ĝin esperantigis rekte el la dana lingvo, konsultante la elgermanan tradukon de D-ro L. L. Zamenhof. Mi ne komprenas la danan originalon, tial mi povas nur fari komparon inter la du esperantaj tradukaĵoj.

En kelkaj lokoj, la du tradukaĵoj havas iom malsaman enhavon: Ekzemple en la Zamenhofa tradukaĵo estas frazo "La reĝo donacis al la ambaŭ trompantoj kavaliran krucon kaj la titolon de sekretaj teksistoj de la kortego", sed en la nuna tradukaĵo estas: "La imperiestro donis al ĉiu el la fraŭdistoj kavaliran krucon por fiksi en la butontruo kaj la titolon teksojunkro." Eble tion kaŭzis la germana traduko.

En kelkaj lokoj, ŝajnas al mi, la nuna tradukaĵo donas pli klaran koncepton: "Ne, mi ne povas riski rakonti, ke mi ne povas vidi la ŝtofon!", sed en la Zamenhofa tradukaĵo: "Ne, neniel mi povas rakonti, ke mi ne vidas la teksaĵon!" Ĉi tie "riski rakonti" estas pli vivoplena esprimo. La esprimo "la granda procesio okazonta" en la traduko ŝajnas al mi pli klara ol "ĉe la solena irado kiu estas atendata." en la Zamenhofa traduko.

Tamen, mi trovas, ke, kelkaj vortoj uzitaj de D-ro Zamenhof estas pli facile kompreneblaj ol la nuna tradukaĵo, kiel ekzemple, "Li havas nenion sur si" en la nuna tradukaĵo estas malpli preciza ol la Zamenhofa "Li estas tute ne vestita".

Tamen, traduko rekte el la originalo estas ofte pli fidela kaj laŭsence kaj laŭguste, do la nuna tradukaĵo estas rekomendinda kaj legenda.

Ŝtemu



PRI E-KURSOJ EN ĈINAJ UNIVERSITATOJ

La E-katedro en la Hiamen-a Universitato nun instruas ĉiusemajne du horojn por leg-skribo kaj unu horon por konversacio. La esp-a konversacio estas lernata en du partoj: la ĝenerala por provizi la gestudentojn per ofte uzataj frazomodeloj, kaj la interparola kun difinitaj temoj. Oni diskutas esp-e ankaŭ pri aktualaĵoj kiuj ilin multe interesis.

La Fremdlingva Instituto en Hi'an, Ŝenhi-provinco malfermis lastjare du E-kursojn en kiuj lernas ne nur la gestudentoj sed ankaŭ instruistoj de la Anglalingva kaj Ruslingva Fakultatoj. Fondiĝis ankaŭ vespera kurso por la interesatoj en la instituto.

Krom E-kurso en la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Esp-on memlernas ankaŭ aliaj studentoj, instruistoj kaj eĉ oficistoj de la instituto. Laŭinforme nova kurso speciale por la geinstruistoj malfermiĝos baldaŭ.

35 gestudentoj de la Pekina Universitato nun lernas Esp-on en du grupoj. Ĉiumatene ĉe la bela lago kaj sur la herbejo troviĝis gestudentoj laŭte legantaj Esp-on. Okazis antaŭ nelonge E-kunsido en

kiu oni rakontis, deklamis eĉ ludis teatraĵeton aranĝitan laŭ la fable "Translokigo de Montoj". La kunsidon ĉeestis ankaŭ la veteranaj esperantistoj-profesoroj de la universitato.

ORGANIZO DE ESPERANTISTAJ MUZIKISTOJ

Laŭ informo en Italio organiziĝis muzikistaj esperantistoj sub la nomo Muzika Esperanta Ligo. Ĝi okazigis la unuan asembleon je la 23-a Itala Esperanta Kongreso. Ĝi diskutis siajn organizajn problemojn kaj agadan planon.

Laŭ ĝia Internacia Bulteno N-ro 2, ankaŭ en Hispana Esperanto-Instituto kreiĝis Muzika Fako por eldoni en Esperanto kanzonojn.



Grupludo

KALKULADO DE RANETOJ

La ludantoj sidiĝu ronde kaj memoru la jenan versaĵon:

Unu raneto,
Unu buŝego,
Du okuloj,
Kvar piedoj.
Plaŭ!
En lageton!

* * *

Du ranetoj,
Du buŝegoj,
Kvar okuloj,
Ok piedoj.
Plaŭ!
Plaŭ!
En lageton!

* * *

Tri ranetoj,
ktp.

Unu el la partoprenantoj komencu la ludon per cito de la unua verso. La apude sidanta lin sekvu per cito de la dua, kaj la ceteraj daŭrigu laŭvice la kalkuladon dirante po unu

version. Atentu, ke la nombro de ranetoj plimultiĝu je unu en ĉiu nova strofo, kaj plimultiĝu konforme ankaŭ la nombroj de la buŝoj, okuloj, piedoj kaj fojoj de plaŭ-bruoj. Tiu, kiu eraras en la kalkulado devas esti punata per kanto, rakonto ktp.

SOLVO

al nia enigmo: "Kial"

(P. 46 de EPC n-ro 1, 1965)

La aŭdorgano de lokusto estas sur ĝia kruro dum serpento distingas sonojn per sia lango etendita eksteren.

Humoraĵo

GRAVAS LA RECEPTO

Iu librovermo aĉetis pecon da porkaĵo, kopiis kuiran recepton kaj ilin kunportis hejmen. Ĵus kiam li demetis la porkaĵon, iu hundo ĝin buŝkaptis kaj kuris for. Lia edzino volis ĝin postkuri por reakiri la viandon, sed li ŝin haltigis dirante: "Ne postkuru ĝin, ĉar la recepto restas en mia poŝo. Forpreninte la porkaĵon, ĝi tamen ne scipovas ĝin kuiri."



Korespondi Deziras

*"Danuba Studento", studenta esp-ista asocio, G. Dimitrov, ĉe SEA "Danuba Studento", str. M. Topalov 28, Ruse, Bulgario.

*Nguyên-công-Chi, oficisto, 5 Ngo Da-Tuong, Ha-Nôi, Vietnamio, kun ĉi kaj interŝ. pm., pk., librojn k gazetojn.

*Erasmus Zilles, Hauptstrasse No. 39, 673 Neustadt/W. Germanio-West, dez. kor. kun aziaj landoj.

*Kuwabara Masao, Nagoya, Minamiku, Sirosita-tyo 3-261, Arikawa Tosio-kata, Japanio, studento de kemia inĝenier-scienso 22-j., kun Ĉinio, Koreio, Vjetnamio k aliaj aziaj landoj pri ĉt.

*S-ino Nikolinka En. Fiĉeva, "Car Osvoboditel" No. 14, Bjala, Bulgario, kun ĉiuj landoj en Azio k Afriko. pri ĉt.

*F-ino Tonka Todorova Djikova, "Ŝipka" 3, Bjala, Bulgario, kun gejunuloj el la tuta mondo.

*S-ro Gaston Tremon, Avenue Croix-Finor, Panazol (Haute-Vienne), Francio, dez. interŝ. pm. k alumetetiketojn kun ĉi. precipe pri kosmaj temoj.

*Andrzej Rek, Lodz, Paderewskiego 3A, Pollando, lernanto de mezlernejo, kun gejunuloj de Azio, Afriko k Latin-Ameriko, pri sporto, filmo, literaturo, muziko, matematiko k kolektas il. pk.

EL POPOLA
CINIO

1950 ★ 1965

Memora Notlibro por EPC-amikoj

Okaze de la
15-a Datreveno de
la Iniciatiĝo de
"EL POPOLA ĈINIO"

Poŝformato, 250 p. kun verda
plasta kovrilo

kun

necesaj referencaj materialoj pri
Ĉinio

kaj

Eterna Kalendaro valida por
Gregoria kaj Julia Sistemoj

Ĝi estas
presata kaj sendota al
EPC-abonantoj en 1965

SEGI VINGLASON

Dum festeno, verŝante vinon en la glasojn de siaj gastoj la gastiganto ĉiufoje nur duonplenigis ilin.

Subite iu gasto stariĝis demandante: "Ĉu estas segilo en via domo?" "Por kio vi bezonas segilon?" demandis la mastro.

Montrante la glason la gasto diris: "Senutila estas la supra parto de la glaso, tial mi volas ĝin forseĝi!"

*Karlo Jamrich, tipografo 44-j., Malacky 21, Ĉeĥoslovakio, pri tipografio, astronomio, kun Francio, Japanio, Italio, Brazilo.

*E-rondeto "Ora Fulmo" aranĝos la 14-IV-65 letervesperon kaj propagandan ekspozicion. Sendu bk kaj simplajn leterojn bele afrankitajn, facilajn libretojn k aliajn esp-ajojn. Nepre respondos kaj rekompencos. "Ora Fulmo" ĉe Teĉnikum Energetyczne, Mielczaoskiego 65, Sosnowiec, Pollando.

*M. Delineŝeva, Polski Trambeŝ, Bulgario, kun ĉi. pri ĉt.

*Korolev Tola, Engelsa 162, kv.6, Rostov-Don, Sovetunio, 14-j. lernanto, dez. interŝ. pm., pk., insignojn.

*18 esp. gelernantoj de liceo en Francio, kun ĉi. pri ĉt. Skribu al la profesoro J. Manceau, 14 rue de la Mine Creutzwald (Moselle), Francio.

